

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2023. №3



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2023. №3 (317)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2023

Abonanto: 15 eŭroj, 15 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 30 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 100 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2023, №3 (317).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 30 сентября 2023 г.

© La Ondo de Esperanto, 2023

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
Jukka Pietiläinen. Relative malgranda, sed bona kaj bonetosa UK en Torino	6
Rezolucio de la 108a Universala Kongreso de Esperanto	9
Amri Wandel. IKU: Maratona scienca programo kaj dramo en Torino	10
Francesco Amerio. Futbala matĉo en Torino: La verduloj gajnis 6-3.....	10
Aleksander Korĵenkov. Gong Xiaofeng, nova estrarano de UEA.....	11
Aleksander Korĵenkov. UK-108: 1319 aliĝintoj el 69 landoj	11
Tri novaj Honoraj Membroj kaj nova Honora Prezidanto de UEA	12
Premio Degučĉi 2023 al Miora Raveloharison	14
12 diplomoj de UEA aljuĝitaj en Torino.....	15
Aliĝu al la unua UK en Afriko	17
Eventoj	18
Liba Gabalda. ILEI kaj TEJO kongresis samloke kaj samtempe	19
La Estraro de TEJO por 2023-2024	20
Legolas. Junulara kongreso apud plaĝo.....	21
Daniele Pesce. Infana kongreseto sporta kaj natura.....	22
Ulrich Matthias. Latvia BET superis ĉiujn atendojn	23
Aleksander Korĵenkov. BET-57: 117 aliĝintoj el 22 landoj.....	24
Russ Williams. La 37a Arkones, denove plaĉa	25
Pavel Polnický. Bjalistoko: Dialogo inter religioj.....	27
Graĝina Opulskienė. La unua aŭtuna kunflugo apud Kaŭno.....	28
Ludmila Novikova. RET en la ĉefurbo de Tatarstano.....	30
Decidoj de la 32a Konferenco de REU	31
Ĉu UEA perdas sian ruslandan asocion?.....	33
Irina Gonĉarova. Kalejdoskopio de lingvoj en Odincovo.....	33
Bert Schumann. Riĉa somero en la Esperanta kastelo	35
Verda naturisma semajno vide de kvin progresantoj.....	36
Benoît Ente. Mergiĝa sesio en Lillo antaŭ Torino.....	39
Patrick Lagrange. Staĝo pri astronomio en Kvinpetalo	40
Edmond Ludwig. Deĵorado en la lorena vilaĝo de la libroj	40
Ursula Niesert, Alois Eder. Libroj – Turoj – Cikonioj.....	41
Zdenka Polašek. Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo	43
Du civitaj renkontiĝoj	45
Aranka Laslo. Renkontiĝo en Serbio	45
Rio-de-Ĵaneiro: Esperanto en la librobienalo	46
Enketilo pri la Esperanto-movado kaj UEA	46
UEA ricevis subvencion per la programo Erasmus+.....	47
Esperanto-kurso por hispanparolantoj en 2023	47
Aleksander Korĵenkov. Esperanto-novajoj en Telegramo	48
Szilvási László. Censo en Hungario: 4 mil 216 sciintoj de Esperanto	49
Aleksander Korĵenkov. Komento: 87-oble pli ol en Ruslando	49
Kunorganizu kun TEJO la IJK-n 2025 en via lando.....	50
La 4a Virtuala Kongreso de Esperanto.....	51

Ĉu vi volas trapasi Esperanto-ekzamenon rete en 2024?	51
La 14a JES okazos en Strokow	52
Lu Wunsch-Rolshofen. Komune festi la Novan jaron: Denove en Wiesbaden	53
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Imre Ferenczy forpasis	54
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Augusto Casquero forpasis	54
Tribuno	55
Subtenu infanojn en Tanzanio iri al la Infankongreseto	56
Ankica Jagnjić. Situacio kaj perspektivoj de Esperanto en Kroatio	57
Deklaracio kaj rezolucio de 96a kongreso de SAT	58
Bernhard Tuidar. Aŭdgvidilo por la Viena Esperantomuzeo	60
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Paco	62
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tradukada Tago	62
Por la reapero de la Esperanto-kursoj ĉe Duolingo	63
Arkivo	64
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2023	65
Kulturo	67
Aleksander Korĵenkov. La ruĝa grafo	68
Aleksej N. Tolstoj. La morto de la familio Nalymov. La inkmakulo. Nataŝa. Manjo. La kunloĝanto. (Tradukis el la rusa Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, Ludmila Novikova, Vladimir Vyĉegjanin)	70
Laure Patas d'Illiers. Kunmarŝi	105
Paulo Sérgio Viana. Formiketo	110
Erika Godó. La kaŝita ŝtuparo	113
Miguel Fernández. Nuntempa hispana poezio verkata de virinoj (2)	114
Wolfgang Kirschstein. Iomete malsamaj, sed ne tre (Recenzo: Johansson S. <i>Falaŝlo en maco</i>)	121
Paulo Sérgio Viana. Reĝo Ubuo (Recenzo: Jarry A. <i>Reĝo Ubuo</i>)	122
Paŭlo Moĵajevo. La albumo antaŭvideble fortika, eĉ se malgranda (Recenzo: Martin kaj la talpoj. <i>Vestiĝoj</i>)	123
Floréal Martorell. <i>Nuda</i> : Nova bitalbumeto de Kjara	125
Floréal Martorell. <i>Primitiva</i> : La unua bitalbumo de YASS	126
Floréal Martorell. Armel Amiot: Nova muzikvideo, baldaŭ nova albumeto	127
Floréal Martorell. <i>Sen timo</i> : La 9a albumo de <i>Kajto</i>	127
<i>La Juna Vivo</i> en la reto	128
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , 2023, №46	129
<i>Literatura Foiro</i> , 2023, №324	130
Karina Oliveira: Nova redaktoro de <i>Kontakto</i>	131
Rezulto de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2023	132
La gajnintoj de la dua Interkultura Novelo-Konkurso	134
Mozaiko	135
Stanislav Belov. Septembro, la eklerna monato	136
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	137
Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i>	138

Kovropaĝe: Kadre de la “lukse kultura” programo de la Torina kongreso okazis pluraj koncertoj, spektakloj de diverslandaj Esperantaj artistoj, inter kiuj estis ankaŭ Ĵomart kaj Nataŝa. (Foto: John Huang).



Dum pluraj jaroj Jukka Pietiläinen prezentas en *La Ondo* siajn resumajn raportojn pri la Universala Kongreso de Esperanto. Kutime li trovas mezan vojon inter la pozitivaj kaj negativaj trajtoj, sed raportante pri la 108a UK, li povis nur konkludi, ke “la kongreso en Torino, malgraŭ la relative malgranda partoprenantaro estis iom lukse kultura kaj bonetosa”. Jam ekpreparu vin al la unua Afrika UK, okazonta venontjare en Aruŝo, Tanzanio. En Torino oni sukcesis antaŭĝui ĝin, interalie, en la Internacia Koncerto (Foto: John Huang)

Relative malgranda, sed bona kaj bonetosa UK en Torino



108a Universala Kongreso de Esperanto

Torino, la 29an de julio – la 5an de aŭgusto 2023

La 108a Universala Kongreso estis la unua vera postpandemia kongreso. Pasintjare la kongreso okazis, sed iuj vojaĝ- kaj aliaj limigoj ankoraŭ ekzistis. Nu, ankaŭ ĉi-jare iuj laŭdire ricevis kovidon dum la kongreso, sed tre malmultaj. La kongreso estis averaĝe pli granda ol la meza (reala) kongreso post la centa UK, sed, hove, estis nur 1319 aliĝintoj. Tamen multaj programeroj estis spekteblaj rete, kaj eventuale multaj, kiuj ne povis vojaĝi, povis spekti parton el la programo. Ankaŭ la milito okazanta en Eŭropo kaj tiurilataj vojaĝproblemoj eventuale malhelpis al iuj partopreni: el Ruslando venis nur Mikaelo Bronŝtejn, kiu multe kontribuis al la programo. Tamen ĉi-foje multaj afrikanoj ricevis vizon kaj aperis en la kongreso kaj ankaŭ varbis por la 109a UK en Tanzanio. La afrika budo ĉe la akceptejo kaj enirejo ofertis diversaĵojn pri la venontjara UK.

Tamen la kongreso estis tre bona. La kongresejo estis konstruaĵo de politeknika universitato kaj la salonoj estis praktike ĉirkaŭ la korto, kie eblis resti dum la varmega somera mediteranea vetero. Koncertoj okazis en supra etaĝo kaj pli grandaj solenaĵoj en eksa fervoja konstruaĵo, kiu estis transformita en kulturcentron. La distanco estis iom longa, sed rapide esperantistoj lernis la plej rektan vojon tra la konstruaĵo kaj trans unu strato.

Ankaŭ alimaniere la aranĝoj estis bonaj: antaŭmendebla vojaĝbileto estis utila por atingi pli forajn ejojn kaj hotelojn kaj la publika transporto funkciis bone, tramhaltejo estis apud la kongresejo.

Ankaŭ la studenta manĝejo, kiu ofertis manĝaĵojn al kongresanoj kontraŭ manĝokuponoj, troviĝis apud la loko por solenaĵoj. Manĝokuponojn tamen eblis aĉeti nur en la akceptejo, for de la manĝejo mem. Krome la haveblo de tri diversaj manĝokuponoj kun nur unu-du-eŭra prezidiferenco kaŭzis pripensadon, kaj ĉe la aĉeto kaj en la manĝejo mem. Aĉetinte la plej kostajn (naŭeŭrajn) kuponojn, mi tamen ne povis kompreni, kion la aliaj ricevis malpli, aŭ eble temis pri malsama manĝo. Pli proksime ol la “oficiala” manĝejo troviĝis kafejo, kie eblis ricevi manĝetojn kaj



drinkaĵojn, kaj sufiĉe facile la esperantistoj trovis ankaŭ tiun lokon. Nu, la ĉefa kurozaĵo de tiu loko estis ke necesis unue pagi ĉe alia giĉeto kaj poste ricevi la drinkaĵon aliflanke de la kafeja salono.

La bankedo kaj balo okazis sur Reĝaj Ĝardenoj, ĉe la iama reĝa palaco, vere ni manĝis subĉiele, kaj la vetero estis sufiĉe agrabla, ne tro varma. Feliĉe ne okazis pluvo dum la bankedo. Kaj, jes, kelkfoje pluvis dum la kongresa semajno en Torino. Dum la balo eblis ankaŭ viziti parton de la kolektoj de la reĝa muzeo, i.a. kun antikvaj statuoj, estis iom aparta etoso viziti la muzeon malfruvespere. Sed la urba akcepto estis unu el la plej malabundaj dum mia UK-kariero, malmultaj ricevis inviton, kaj la ofertitaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis vere malmultaj.

La nacia vespero prezentis ne nur muzikon, dancojn kaj aliajn pli-malpli kutimajn aferojn, sed ankaŭ la magian arton, kiu iom famas en Torino. La scienca programo estis iom nekutime abunda. Kadre de la scienca programo prof. Věra Barandovská-Frank faris sian prelegon malgraŭ tio, ke ŝi rompis la manon, kaj tuj post la prelego estis portita al hospitalo, kie ŝi ricevis gipson.

Popularis ankaŭ la KER-ekzamenoj pri lingvoscio de Esperanto, kaj inter la partoprenantoj estis multaj neeŭropanoj. Mi mem partoprenis la skriban parton en la nivelo C1, kvankam eĉ la plej supra C2-nivelo ne estus tro malfacila por mi.

UEA havis siajn kutimajn kunsidojn, kaj ne mankis kritiko ankaŭ ĉi-foje. Kvantam la funkciado de la pagosistemo per uea-kontoj estas nuntempe (ankaŭ laŭ mia sperto) pli bona ol antaŭe, la unua demando en la programero "UEA respondas" temis pri nesukcesinta pago, kaj iom kolorigis la programon per pli kritika atmosfero. Tamen kutime kaj jam tradicie ĝuste tiu programero estas tre kritika, ankaŭ sendepende de tio kio okazas en realo. Krome, mankis demando pri la libroservo, eble mi mem estus devinta fari tiun.

La kultura programo estis iom nekutime bona, vere eĉ luksa, koncertis *Kajto*, Kim Henriksen, Ĵomart kaj Nataŝa, Mikaelo Bronŝtejn kaj Georgo Handzlik, jOmO, ĉiuj jam tre tradiciaj, sed ankaŭ bone akceptitaj por la kongresa publiko, kiu ja emas al ia tradicieco. Aperis ankaŭ pli novaj artistoj, interalie, Kjara kaj Abel Massiala, kiujn mi tamen ne havis eblecon mem spekti. La libroservo estis centre lokita apud la akceptejo, kaj ĝin prizorgis ankoraŭ la kutima Ionel Oneț, dum la eventuala transiro de la Libroservo al eventuala alia prizorganto ankoraŭ ne okazis.



Koncerto de Kjara (Chiara Raggi) en Torino

Internacia arta vespero, kiun mi ofte ne ĉeestis pro la foje malalta kvalito de prezentaĵoj fare de kongresanoj mem, estis ĉi-foje bona, kaj ankaŭ tre tutmonda, klara malplimulto el prezentaĵoj estis farita de eŭropanoj. Mi vere ĝojis ke mi decidis partopreni. Daŭrigante pri internacieco kaj tutmondeco, kion pensi pri tio, ke en Belartaj konkursoj 75 el 180 konkursaĵoj estis verkitaj de neeŭropanoj? La esperanta kulturo klare transiras el Eŭropo al pli internacia geografio.

Ĉi-foje ne okazis problemoj kun la kongresa poŝtelefona aplikaĵo, per kiu eblis legi la kongresan programon per sia telefono, aŭ almenaŭ mi ne rimarkis tian problemon. Utilis havi programon kun aldonoj kaj nuligoj en sia telefono.

La kongresa kuriero *La Taŭra Voĉo* estis relative magra, multaj numeroj estis nur dupaĝaj kaj en iuj numeroj aperis plejparte nur fotoj el la kongresa programo. “Mankis kontribuaĵoj”, – estis la respondo, sed la redaktanto povus eventuale ankaŭ mem kontribui. Tamen eble la ĉi-jara kuriero venkas premion pri la plej bildigita kongresa kuriero, entute aperis 51 fotoj en sep numeroj. Eventuale la UKoj spertas ian generacian krizon, dum la pli juna generacio ne same facile sendas siajn raportojn al la kuriero. Pri la generacia ŝanĝo atentigis ankaŭ tio, ke la rolon de aŭkcisto prenis Michael Boris Mandirola post Humhrey Tonkin. Ne ĉeestinte la aŭkcion mem, mi ne povas diri pri la sukceso, kiu tamen laŭdire estis bona.

Eblas nur konkludi, ke la kongreso en Torino, malgraŭ la relative malgranda partoprenantaro estis iom lukse kultura kaj bonetosa.

Jukka Pietiläinen

Fotoj de John Huang

Iĝu abonanto de “La Ondo de Esperanto”!

Rezolucio de la 108a Universala Kongreso de Esperanto

La 1 318 partoprenantoj de la 108a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto 2023, traktis la temon “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”. La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniam lingvaj baroj malhelpis interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis – en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.

Tio validas por ĉiuj migrantoj – ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto.

Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:

1. La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion.

2. Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro unuafoje superis la ciferon¹ de 100 milionoj. Ni avertas, ke pro la klimatsanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.

3. Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.

4. Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvinkitaj ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado – migrado estas bazo por la evoluo de la homaro.

5. Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj proklamitan en la jaro 1948.

6. Nun, en la jaro de la 75a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgo ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.

7. Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

Torino, Italio, 5 aŭgusto 2023

1. La aŭtoro(j) de la kongresa rezolucio uzas la evitendan kromsignifon de la vorto “cifero”. En oficiala dokumento estus pli taŭgaj la vortoj “nombro” aŭ “kvanto” (*La red.*).

IKU: Maratona scienca programo kaj dramo en Torino

Kadre de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) ĵaŭde okazis rekorda nombro de naŭ prelegoj samtage, ĉiuj estis hibridaj. Kvin de la Scienca Kafejo: La Memoro (Butan), Mondregeco (Dawson), La unuaj Esperanto-vortaroj (Eckert), La danĝera lumo (Fontaie), Kalkuliloj (Lo Jacomo), kaj sekve kvar IKU-prelegoj pri variaj temoj: Reguleco kaj nereguleco en la homa lingvo (Grant Goodall) kaj la daŭrigaj IKU-AIS prelegoj pri Kvantuma interplektiteco: la mistera kvantuma gluo de Jesper Jacobsen, La kikonga lingvaro de Heidi Goes kaj Lingva Pejzaĝo de Gabriel Labrie.

Ĉiujn prelegojn oni povis sekvi rete. En la prelegoj de Jacobsen kaj Labrie okazis AIS-ekzamenoj en kiuj partoprenis sukcese dek kaj ses aŭskultantoj, respektive.

Drama momento okazis en la marda IKU-prelego de prof. Věra Barandovská-Frank. Antaŭ sia prelego ŝi rompis la manon kaj tamen insistis liveri la prelegon malgraŭ fortaj doloroj. Tuj post la prelego ŝi estis urĝe portita al la hospitalo, kie ŝi ricevis gipsan memoraĵon el Torino.

Amri Wandel

Futbala matĉo en Torino: La verduloj gajnis 6-3

Dum la 108a UK en Torino okazis la jam tradicia futbala matĉo de la Esperanto-Teamo. Ĉi-jare, agorde kun la kongresa temo “Enmigrado kaj kunfluo de homaj valoroj”, la matĉo okazis kontraŭ teamo, kiu reprezentis la novajn torinanojn el Peruo. En ĉarma internacia etoso la du teamoj ludis en moderna ludejo de la Torina futbal-asocio “Cit Turin Lde”. En la suna kaj varma vendreda posttagmezo la esperantistoj gajnis la matĉon 6-3 ankaŭ danke al la helpo de Eugenia kaj Salimata, du knabinoj kiuj ludas en la loka teamo “Cit Turin”.

Francesco Amerio



Gong Xiaofeng, nova estrarano de UEA

En Torino la komitato de UEA elektis novan estraranon (la naŭan) Gong Xiaofeng el Ĉinio. Gong Xiaofeng, konata en Esperantujo kiel Arko, naskiĝis en 1962, diplomiĝis pri kemio, doktoriĝis pri nutra scienco kaj laboras kiel profesoro pri media scienco kaj inĝenierado. Ŝi eklernis Esperanton en 1980 kaj baldaŭ ekinstruis ĝin, interalie, kiel nedevigan kurson dum kelkaj jaroj ĉe Nanchanga Universitato.

En 2008 Gong Xiaofeng klopodis restarigi la Ĉinan Sekcion de ILEI, kiu de tiam kreskas rapide, ŝi ĉeforganizis seriojn da seminarioj pri Esperanto-instruado kaj trejn-kursaron en diversaj urboj, tri orient-aziajn seminariojn de ILEI en Tianjin (2011), Kunming (2012) kaj Quanzhou (2016); tri Vintrajn Esperanto-Kursarojn kaj kelkajn KER-ekzamenojn. En 2012 ŝi sukcese ĉeforganizis la 45an konferencon de ILEI en Kunming. Kiel prezidanto de Jiangxi-a Esperanto-Asocio, ŝi organizis kvin sesiojn de Lushan-forumoj de Esperanto (2008-14).

Ŝi estis vicprezidanto de ILEI (2013-18) kaj prezidanto de Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj (2009-18).



AIKo

UK-108: 1319 aliĝintoj el 69 landoj

Antaŭ la komenco de la 108a UK al ĝi aliĝis 1249 homoj el 65 landoj. Surloke en la listo de la kongresanoj aperis 70 pliaj nomoj, inkluzive de 40 italoj, kaj sume al UK-108 aliĝis 1319 personoj el 69 landoj.

Vidu la liston de la unuaj dek landoj laŭ la aliĝnombro: Francio 206, Italio 176, Germanio 108, Pollando 67, Hispanio 57, Koreio 51, Usono 49, Brazilo 48, Belgio 42, Ĉinio 41.

Sume el la unua landodeko aliĝis 845 personoj, t. e. 64% de la tuta kongresanaro, kaj 36% estas el la ceteraj 59 landoj.

Komparante la aliĝnombrojn de ĉi-jarcentaj UKoj, ni vidas, ke la Torina UK superis la kongresojn en Bonaero (706 aliĝintoj en 2014), Montrealo (859 en 2022), Hanojo (866 en 2012), Lahtio (917 en 2019), Havano (1022 en 2010), Rejkjaviko (1034 en 2013), Seulo (1195 en 2017) kaj Nitro (1253 en 2016), sed la aliĝintaro al UK-108 atingis nur 59,7% de la aliĝintaro al UK-91, okazinta en la itala urbo Florenco en 2006 kun 2209 aliĝintoj.

Al la kongreso venis ne ĉiuj aliĝintoj; ekzemple, nur unu el la ses ruslandaj aliĝintoj, sed UEA ne disponigas la statistikon pri la reala nombro da kongresanoj.

AIKo

Tri novaj Honoraj Membroj kaj nova Honora Prezidanto de UEA



Laŭ la Regularo pri Honoraj Membroj, Honoraj Prezidantoj kaj Diplomo pri Elstara Agado, la Komitato de Universala Esperanto-Asocio (UEA), surbaze de propono de la Estraro de UEA, povas aparte distingi esperantistojn, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-movado, per la titolo Honora Membro (HM). Krome, kiel Honora Prezidanto (HP) povas esti nomumita esperantisto, kiu aldone havis eksterordinarajn meritojn por UEA.

Dum sia unua kunsido en Torino la Komitato elektis tri novajn HMOjn: Katalin Kováts, Anna Löwenstein kaj Privas Tchikpe. Aldone estis elektita unu nova HP: Renato Corsetti.

D-ino **Katalin Kováts** naskiĝis en Budapeŝto la 16an de oktobro 1957. Ŝi estas hungara esperantisto, pedagogo, lingvisto kaj instruisto. Ŝi estas fondinto en 2001 kaj redaktoro de la paĝaro Edukado.net; estis ano de la Akademio de Esperanto (2007-22); kaj Esperantisto de la Jaro en 2010. En UEA ŝi estas ekde 2009 la motoro de la ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER-ekzamenoj) kaj same unu el la ĉefaj profesoroj de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz. Ŝi verkis diversajn instrucelajn verkaĵojn, inter kiuj furoras *Poŝamiko*. En 2005 ŝi tradukis la memtaksilon de la KER-ekzamensesio kaj aperigis ĝin en la *Manlibro pri instruado de Esperanto*, kiun ŝi redaktoris. Ŝi estas dumviva membro de UEA.

Anna Löwenstein naskiĝis en Britujo en 1951. Ŝi estas esperantisto, redaktoro kaj verkisto. Ŝi estis elektita Esperantisto de la Jaro 2019. Löwenstein laboris en la Centra Oficejo de UEA de 1977 ĝis 1981, kie ŝi redaktis la Jarlibron de UEA en 1981. Ŝi estis redaktoro de la facila parto de *Kontakto* (kaj krome verkinto de la listo de 1000 morfemoj uzataj en la facila parto) de 1983 ĝis 1986. Ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto ekde 2001. En UEA ŝi estas la fondinto kaj motoro de

la Movada Foiro en la UKoj. En 2019 ŝi kreis la retejon <https://uea.facila.org> kun mallongaj kaj facilaj artikoloj por novaj esperantistoj, kiun ŝi ĉefredaktoras. Ŝi partoprenis en pli ol 28 UKoj kaj estas membro de UEA dum pli ol 40 jaroj.

Privas Tchikpe naskiĝis en Benino en 1963. Krom Esperanton, li parolas la aĝaan, la fonuan, la francan kaj la anglan. Li esperantistiĝis en 1981 kiel la unua esperantisto en Benino. Kun kelkaj amikoj, al kiuj li instruis Esperanton, li fondis en 1983 la unuan landan asocion de Benino, Beninan Esperanto-Asocion, agnoskitan de la Ministerio pri Internaj Aferoj. En 2009 li fondis kun Mireille Grosjean el Svislando la asocion Scio Sen Bariloj (SSB), neregistaran organizon, kiu laboras por ebligi aliron al lertigado de homoj. Kerna agado de SSB estas disvastigo de Esperanto kaj virina kapablo al gvidaj roloj. En 1991 li organizis kiel prezidanto de LKK sukcesan duan Afrikan Kongreson de Esperanto en Kotonuo, kun partopreno de dekoj da eksterafrikaj esperantistoj. En 2013 li denove estis prezidanto de la Kongresa Organiza Komitato (KOKo) respondeca pri la okazigo de la kvina Afrika Kongreso de Esperanto. Okaze de 104a UK en Lahti (2019) li ricevis Diplomon pri Elstara Agado de UEA rilate al sia gvidado de Scio Sen Bariloj. Li estas dumviva membro de UEA.

Renato Corsetti naskiĝis la 29an de marto 1941 en Romo. Li estas esperantisto ekde la 1960aj jaroj. Li havis multajn postenojn en la movado, estis interalie prezidanto de TEJO kaj prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio. En UEA li deĵoris en la Estraro de 1980 ĝis 1986 kaj 1998 ĝis 2007, la lastajn ses jarojn kiel prezidanto de UEA. En 1998 li estis elektita membro de la Akademio de Esperanto kaj ekde 2020 li denove anas en la skipo de lingvaj konsilantoj de *Monato*. Li verkis en Esperanto kaj en la itala pri lingva politiko, Esperanto, infana dulingveco, psikopedagogio de lingvo kaj komunikado. Li jam estas honora membro de UEA kaj honora prezidanto de TEJO.

Ĝis Torino en UEA estis 23 honoraj membroj, el kiuj neniuj el Afriko (tiam 17 devenis el Eŭropo, 5 el Azio kaj 1 el Ameriko). La Estraro konsideris, ke per elekto de merita homo kiel Privas Tchikpe la listo ekgajnas pli valoran diversecon. Same pri reprezenteco de virinoj inter la HMOj: el la antaŭaj 23 HMOj nur tri estis virinoj. La elekto de meritplenaj virinoj kiel Katalin Kováts kaj Anna Löwenstein same kreskigas tiun reprezentecon. Tiuj aspektoj gravas por la tutmondeco kaj diverseco de UEA.

Ĝi estas demonstra versio de la 141-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



La kongresa sezono en Esperantujo ĉi-jare estis denove bunta: ne nur kongresoj, tendaroj kaj renkontiĝoj, sed ankaŭ Esperanto-centroj logis ferii inter samlingvanoj. Ekzemple, Verdaj Skoltoj elektis Greziljonon, kie ili ne nur lernis kaj skoltumis en la Esperanto-kastelo, sed ankaŭ esploris la ĉirkaŭaĵon. La foto de Michaela Stegmaier montras ilin sur dolmeno.



La komuna kongreso de ILEI kaj TEJO (Foto: Giovanni De Lucia)

ILEI kaj TEJO kongresis samloke kaj samtempe

La 56a Kongreso de ILEI kaj la 79a IJK de TEJO okazis la 5-12an de aŭgusto tuj post la Universala Kongreso en Torino. De tie ni translokiĝis al Lignano Sabbiadoro ĉe la marbordo. Al la kongreso de ILEI aliĝis 157 geesperantistoj el 30 landoj. La kongresoj okazis en la bela rezidejo *Bella Italia* ĉe pinarbaro kun zumantaj cikadoj. Tie ni loĝis en pluraj domoj dise en la arbaro kaj la programeroj okazis en kvin malsamaj lokoj je diversaj distancoj.

La kongreso de ILEI estis hibrida, kaj esperantistoj, kiuj ne povis ĉeesti pro manko de vizoj aŭ pro aliaj kaŭzoj, povis profiti kelkajn programerojn rete de sia hejmo, kaj samtempe eblis interveni aŭ prezenti siajn prelegojn. Tio estas granda avantaĝo kaj ŝparo de vojaĝkostoj por multaj. Okazis multaj samtempaj programeroj kaj ni povis ĉeesti alterne iun ajn el ambaŭ kongresoj.

La ĉefa temo estis: “Intergeneracia kunlaboro pri edukado – instrui Esperanton en lernejoj”. Ĝi estis plene reprezentata en la komuna programo.

Okaze de la inaŭguro en la salono Zamenhof bonvenigis nin Bruĉjo Kasini, Laura Brazzabeni, Alessandra Madella. Nome de la junularo salutis la nuna prezidanto de TEJO Alberto Stalin Garrido kaj la venonta prezidanto Tyron Surmon. La ĉefparoladon prezentis la prezidanto de UEA Duncan Charters. Oni legis salutojn de lokaj instancoj kaj de esperantistaj asocioj. Rete salutis la prezidanto de ILEI Ahmad Reza Mamduhi. Honoris nin la ĉeesto de la jam menciita prezidanto de UEA, de la sekretario Alex Kadar kaj de la ĝenerala direktoro Martin Schäffer.

Okazis lingva festivalo, kursoj por komencantoj kaj por progresantoj, trejnseminario “Interkultura kompetento”, “Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneano en

la mondo”, Frazologio, Lernolibroj de Esperanto, La vojo al perfektigo, Lerneja agado inter Francio, Slovenio kaj Ruslando, Esperanto-instruado en ĉinaj lernejoj, Kutimoj, Tradicioj kaj historio de Ukrainio, 60-jariĝo de la revuo *Kontakto*, La 30 oraj horoj k. m. a.

Estis prezentitaj pluraj prelegoj, interalie, pri Litovio kaj Ukrainio, Ĉernobilo, homaj rajtoj en Pakistano, instruado de la kroata lingvo, instruado de lingvo al pliaĝuloj, famaj virinoj... “EkItalio” estis malkovro de la lando per vojaĝo inter la dudek regionoj de Italio kaj per rigardo de iliaj kulturoj kaj tradicioj. Interesa estis la prelego “Bonkvalita teo similas al belulino”.

Krome okazis AMO (Aktivula MaturiĝO) – seminario №102 kun la titolo: “Interkulturo en Lernejoj”. Estis diversaj diskutoj kaj interŝanĝoj pri instruaj spertoj.

Estis proponitaj allogaj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj: Udine, Marano Lagunare, Aquileia kaj Grado, Venecio kaj Murano, Triesto kaj Groto Giganta, San Vito al Tagliamento kaj San Daniele del Friuli.

Vesperaj programeroj konsistis el koncertoj de JoMo, Ĵomart kaj Nataŝa, Muzikalo 1 *Petveturaj aventuroj*, Muzikalo 2 *La sorto gvidos vin*.

Eblis spekti filmojn, praktiki jogon, ĉigongon, aikidon, internaciajn popoldancojn, krei sian unuan retejon aŭ korean paperan ventumilon, aperis ludforma origamia ateliero, kvizo, teatraĵo *Edukado por paco* k. a. Eblis sporti kaj ĝui la plaĝon. Gejunuloj prezentis la venontan IJK, kiu okazos en Litovio.

Okazis kunvenoj de BEMI, komitato de ILEI, asembleo de Itala Instituto de Esperanto.

Vendrede vespere okazis la ferma ceremonio de ambaŭ kongresoj. La aĝuloj kaj la gejunuloj bone interrilatis kaj ĝuis komunajn eventojn. Koran dankon al la organizantoj pro la bona sukceso!

Liba Gabalda

La Estraro de TEJO por 2023-2024

La Komitato de TEJO elektis la Estraron de TEJO por la mandato 2023-2024, kaj ni ĝojas prezenti la novelektitan teamon al vi!

Prezidanto: Tyron Surmon (Britio)

Vicprezidanto: Snehaĝa Venkatesh (Barato)

Ĝenerala Sekretario: KuboF Hromoslav (Slovakio)

Kasisto: Patricio Agustín Iglesias (Argentino)

Estrarano: Abhinav Varma (Barato)

Estrarano: Ada Florence Iracadukunda (Burundo)

La nova Estraro ekoficis la 1an de septembro 2023. Gratulon al ili, kaj ni deziras agrablan kunlaboron kaj sukcesan mandaton al ĉiuj!

Laŭ www.tejo.org

Junulara kongreso apud plaĝo

Al la 79a Internacia Junulara Kongreso (IJK) venis 225 homoj de 46 landoj per diversaj veturiloj. BEMI denove organizis biciklan karavanon, kaj ĉi-jare estis la unua sezono de Esperanto Senlime (baldaŭ spektebla en Jutubo), kie 17 junuloj per diversaj vojaĝmanieroj konkuris por atingi Barcelonon kaj gajni kiel eble plej multe da poentoj survoje, poste ili kune vojaĝis al IJK.

Ĉi-jare IJK okazis la 5-12an de aŭgusto en Lignano Sabbiadoro, nordorienta Italio, do estis varmege. Sed tio ne estis problemo, ĉar estis granda, bela, sabla plaĝo apud la kongresejo. Tie oni povis naĝi kaj plaĝumi kaj simple ĝui la sunon. Se nur plaĝumi iĝis tro enue, estis multaj programeroj pri ludoj, lingvoj, arto, dancoj, scienco kaj tiel plu. Okazis ankaŭ koncertoj kaj diskejo, kaj eĉ du muzikaloj. Por lernemuloj, kiel kutime, estis KdE-trejnado, ĉi-foje pri kiel aktivigi junulojn kaj plivivigi la junularan movadon. La partoprenantoj ne nur lernis multajn aferojn, kiuj utilos por iliaj junularaj organizoj, sed ankaŭ KdE subtenis ilian aliĝkotizon.

Sed la plej bona parto de la kongreso estis nek la ejo, nek la programeroj, sed la homoj. Ĉie oni trovis esperantistojn ludantajn, parolantajn, manĝantajn, umantajn kaj simple ĝuantajn la kongreson. Tio simple estis laŭinda eĉ por mi, kiel volontulo de TEJO, kiu ĉiutage laboras kaj vivas Esperante.

Se vi nun bedaŭras vian malĉeeston aŭ havas postkongresan sindromon, ne zorgu; venontjare estos la 80a IJK en Litovio, kaj baldaŭ vi povos spekti la muzikalojn en la jutuba kanalo de TEJO.

Legolas

En la IJK-fotaro la plej ofte fotita programero estas la trinkomanĝa nokto (Foto: Konrad Orawski)



Infana kongreseto sporta kaj natura

– Ĉu apud Torino estas... kastelo? – Ne nur unu, sed pluraj. – Nu, ĉu ĝin ĉirkaŭas arbaro? – Jes, kun cervoj kaj lupoj. – Ĉu... – Haltu! Estus pli koncize tiel ĉi: Natura Parko La Mandria, ejo de la 51a Internacia Infana Kongreseto. Nur dekduo da infanoj partoprenis kaj por multaj estis la unua fojo eksterhejme, kelkaj ploroj miksiĝis kun ridoj, sed ĉiuj travivis la programon, kiu, laŭ la ideo de la respondeculo Daniele, proponis naturon kaj sporton. Do, la partoprenintoj.... “naturesportis” la Parkon!

La loĝado estis en farmodomo kaj ĉiutage la infanoj kaj la akompanantoj biciklis laŭ la plurkilometraj vojoj por atingi la diversajn interesaĵojn. Kaj kiu ne scipovis bicikli? Lernis rapide! Tio estis nur la komenco.

Kiajn aliajn “naturesportojn” ili devis ellerni? En la vizitcentro de la Parko ili devis moviĝi tra la arbaro nudpiede kaj poste eskapi el la arbaro solvante naturenigmojn. La Parko bredas ĉevalojn, do ne povis manki rajdado. Kial ne iom da fotoĉasado al vivantaj bestetoj, kiel skorpionoj kaj serpentoj? Tion oni faris dank’ al profesia naturfotisto. Aliaj profesiuloj instruis kiel moviĝi, ataki kaj fuĝi mimante falkojn kaj aliajn rabobestojn. Klare, oni ankaŭ naĝis... bedaŭrinde en nenatureca naĝejo, ĉar la torento proponita de la respondeculo ne estis akceptita post regula voĉdonado.

Kio alia? Indas almenaŭ citi la grimpadon per ŝnuroj sub la minaco de subita fulmotondro... kaj tra ĉio ĉi la respondeculo plendis, ĉar ne ĉiuj programeroj estis plenumitaj, precipe la noktaj, pro laciĝo (la partoprenintoj estis tre junaj).

Ne mankis vizito al la apuda Reĝa Palaco kaj ludado en la “fantacasino” ene de la barokaj ĝardenoj. Antaŭvespermanĝoj estis dediĉitaj al ateliero pri origamio kaj pupteatro zorge de Larysa kaj Alain.

Daniele Pesce





Latvia BET superis ĉiujn atendojn

La ĉi-jaraj, 57aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Latvio, kun 117 aliĝintoj el 22 landoj, estis eksterordinare bone planita kaj organizita aranĝo. Oni elektis tre allogan urbon Ventspils ĉe la bordo de la Balta Maro, kaj perfektan kongresejon, kie oni loĝis, manĝis kaj kunvenis en apudaj domoj.

La kostoj por aliĝo, loĝado kaj manĝado estis, almenaŭ el mia germana vidpunkto, tre malaltaj. Des pli mi surpriziĝis pri la sufiĉe luksaj ĉambroj kaj la bonegaj, abundaj manĝoj kun salata bufedo, desertoj, varmaj kaj malvarmaj trinkaĵoj. Mi apenaŭ sentis la mankon de apartaj vegetaraj manĝoj.

La programo de la BET enhavis multajn interesaĵojn. Aparte mi ŝatis la kvizon de italaj junuloj pri Eŭropa Unio kaj la du prelegojn de Giovanni De Lucia pri italaj regionoj kaj italaj gestoj. Mi mem faris tripartan prelegon pri "Esperanto kaj interhomaj rilatoj" kun aparta atento pri seksa vivo.

Kiam estis truoj en la programo (ekzemple mi ne tro interesiĝis pri ekskurso al bierfarejo), oni povis atingi per 30-minuta promenado belegan strandon kaj naĝi tie.

Aparte sukcesaj estis la artaj programeroj. Ni ĝuis koncertojn de diversaj latvaj ensembloj (el kiuj unu kantis ankaŭ en la liva lingvo), dancis, havis kortuŝan koncerton de ukrainoj kaj sukcesan internacian vesperon (ekzemple kun tre belaj kantoj de koreinoj). Ĉiunokte Sergio Straŝnenko gvidis kantan rondon, kiu vekis en mi belegajn rememorojn pri mia unua kaj sola Esperanto-renkontiĝo en Sovetunio, InterSEJT-2 en 1989 en Minsko.

Kulmino de la arta programo estis por mi – kaj verŝajne por multaj BET-anoj – la koncerto de Anta Enĝele. Ĝuste en 1989 en Minsko mi konatiĝis kun ŝi, kaj en 1992 en la UK en Vieno mi povis denove ĝui ŝian koncerton, kiun ŝi ofertis tie kune kun aliaj latvaj knabinoj sub gvido de la karmemora Austra Pumpure. Intertempe Anta fariĝis profesia kantistino kaj estas sufiĉe populara en sia lando. Post longa paŭzo ŝi nun revenis al la Esperanta scenejo kaj entuziasmigis nin per po deko da belegaj kantoj en la latva kaj en Esperanto.

En la antaŭlasta kongresa tago, ni surpriziĝis pri ĝojiga anonco: Juna kongresanino devis iri al hospitalo ... kaj naskis tie, du monatojn pli frue ol antaŭvidite, sanan knabineton.

En la adiaŭa vespero ni festis en la apudmara subĉiela muzeo kaj dancis laŭ latva popola muziko. Estis belega atmosfero, kaj ni ĉiuj povis ĝui luksan vespermanĝon, kiu kostis eĉ ne dekonon de la bankedo en la UK.

Ni elkore dankas al la organiza teamo – precipe al ties ĉefino Margarita Želve kaj ties plej sperta anino – la 89-jara Bīruta Rozenfelde, kiu organizis jam antaŭ 64 jaroj la unuan BET (tiam ankoraŭ ĈET – Ĉebalta Studenta Esperanto-Tendaro) en 1959.

Por la venonta jaro, oni planas okazigi la 58an BET en Tartu en Estonio, denove en julio, sed eble nur dum kvar tagoj.

Ulrich Matthias

BET-57: 117 aliĝintoj el 22 landoj

Laŭ la statistiko, publikigita en la lasta (la oka) numero de *Freŝa Vento*, la ĉiutaga gazeto de la 57aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, okazintaj la 15-22an de julio 2023 en Ventspils (Latvio), al BET-57 aliĝis 117 personoj el 22 landoj, plej multe el Litovio – 32 personoj.

Konatiĝu kun la definitiva laŭlanda statistiko.

32 Litovio

27 Latvio

12 Germanio

8 Estonio

6 Italio

5 Finnlando, Koreio, Pollando

3 Hispanio

2 Francio

1 Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Hungario, Israelo, Kanado, Komoroj, Ruslando, Svedio, Svislando, Ukrainio, Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj

117 estas malpli ol duono de la aliĝintaro al la pasintjara BET-56, okazinta la 9-16an de julio 2022 en Klajpedo (Litovio) kun 263 aliĝintoj el 31 landoj.



AIKo

La 37a Arkones, denove plaĉa

La long-tradicia semajnfina renkontiĝo Arkones okazis la 37an fojon septembre en Poznano. Ĉi-foje ĝi estis iomete pli frue ol kutime, meze de la monato (la 15-17an). Estis videble malpli multaj partoprenantoj (82 aliĝoj) ol kutime, tamen la programo enhavis plurajn interesajn prezentojn, kaj mi kaj Anna ĝuis la eventon.

Kiel kutime, la du vesperaj programoj havis multan muzikon, kion mi ŝatas pri Arkones. Samkiel antaŭ jaro, estis spektaklo de ukraininoj rifuĝintaj de la milito. Ili portis tradiciajn vestaĵojn kaj bele kantis plurajn kantojn. Krome Oksana Kovalivska kaj Daria Dubynina individue kantis ukrainajn kantojn. Marcin Dęga bele ludis klasiĝan polan pianan muzikon. Nemalhavebla dum Arkones estas koncerto de Suzana Kornicka, sed ĉi-foje ŝi kantis sen ludi gitaron, ĉar ŝia fianĉo Mirek akompanis ŝin per klavara sintezilo! Krome ŝia filino Natalia prezentis hiphopajn dancojn, do muzika prezentado vere iĝis familia afero. Kaj fakte ne mankis gitara muziko, danke al koncerto de Nedeljka Ložajić. Krom la multaj diversaj muzikaĵoj vespere, estis ankaŭ skiza prezento pri kelkaj interesaĵoj el la historio de la urbo Poznano.

Funkciis la kutima libroserveto kun multaj malnovaj libroj (mi aĉetis historie interesan libreton de laboristaj kantoj el 1949!) kaj novaj libroj eldonitaj en Bjalistoko.

Koncertas Suzana Kornicka kaj Mirek Bartkowiak (Foto: Andrzej Sochacki)





Ĉi-jare la bufeda menuo ofertis veganajn sandviĉojn, plaĉa progreso por veganoj kiel mi kaj Anna.

La taga programo estis 2-traka (do mi kompreneble maltrafis multajn aferojn), en la kutima granda ĉambro Spegulejo kaj en la malgranda Svarmejo, sed ĉi-jare la Svarmejo efektive estis alia ĉambro, iomete pli granda ĉambro ol en pasintaj jaroj, kaj tio ja pli konvenis. La programo kovris diversajn temojn.

Pri historio: Barbara Pietrzak parolis pri Jan Baudouin de Courtenay, pola lingvisto antaŭ jarcento; li ne konsideris sin esperantisto sed agnoskis avantaĝojn de Esperanto. Yu Jianchao prezentis la vivon kaj verkaron de Laŭlum, kiu multege tradukis el la ĉina literaturo en Esperanton kaj krome verkis originale, instruis, redaktis, ktp. Hoan Tran (Ĝojo) rakontis pri tatuoj tra vjetnama historio. Roland Schnell parolis pri la 1920aj jaroj en Berlino.

Pri literaturo: krom Laŭlum, estis ankaŭ prezentita Machado de Assis, brazila verkisto iom tradukita en Esperanton. (Mi legis kolekton de liaj teatraĵoj en Esperanto antaŭ kelkaj jaroj.) Estis kvizo pri literaturo. Kadre de la verkista grupo Bobelarto okazis kuna voĉlegado de Esperantaj rakontoj el la freŝe eldonita libro *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj*, kiun mi ĝuis.

Mi ankaŭ ege ĝuis la interesan amuzan informan prezenton de la sperta libro-kompostisto Przemysław Wierzbowski pri interpunkcio, ĝia ĝenerala historio kaj evoluo tra jarcentoj, ĝiaj diversaj konvencioj en nunaj naciaj lingvoj, kaj la manko de klare difinitaj interpunkciaj konvencioj en Esperanto. Maurizio Giacometto prezentis la amuze provokan kaj pensigan koncepton de “kontraŭbiblioteko” de Umberto Eco: kontraŭbiblioteko estas viaj posedataj libroj, kiujn vi ankoraŭ ne legis, kaj eble neniam legos, tamen indas kaj utilas posedi ilin! Li prezentis ankaŭ la retejon uea.facila.org.

Pri lingvistiko kompreneble ne mankis, ĉar kiel kutime instruistoj kaj studentoj de la interlingvistikaj studoj partoprenis, ekzemple, Ilona Koutny pri ĝentileco en internacia komunikado, Michael Farris pri piĝinoj, Rafał Darasz pri signolingvoj, Gong Xiaofeng (Arko) pri la malsamaj simbolaj signifoj de koloroj en diversaj kulturoj kaj lingvoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 141-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

RET en la ĉefurbo de Tatarstano

Ekde la 14a ĝis la 23a de aŭgusto apud la urbo Kazano, ĉefurbo de la Respubliko Tatarstano, en la turisma ripozejo “Cigna” okazis la tradicia renkontiĝo Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET), kiun partoprenis 80 esperantistoj el 33 rusiaj urboj, ankaŭ kelkaj eksterlandanoj.

La ĉeftemo de RET estis “Du popoloj – du kulturoj”.

En la kadro de RET pasis raport-elekta konferenco de Rusia Esperantista Unio (REU), kiu akceptis novan version de la Statuto de REU, elektis la prezidanton de REU (la posteno restis ĉe Aleksandro Lebedev), la estraron kaj la revizian komisionon de REU.

Estis prezentitaj instruaj kaj distraj programoj: paroliga kaj tradukista kursoj, kiujn gvidis spertaj esperantistoj Svetlana Smetanina kaj Mikaelo Bronŝtejn; diversaj informaj kaj diskutaj rondotabloj, Poezia horo de Raja Kudrjavceva, amuza prezentaĵo de Mikaelo Abramoviĉ. Precipe riĉa estis la koncerta programo: poezia-muzika komponaĵo pri Osip Mandelŝtam (gvidantoj Mikaelo Bronŝtejn kaj Ludmila Novikova), personaj kaj grupaj kantkoncertoj de Mikaelo Povorin, kvaropo *Ekvinokso* (Andreo Obrezkov, Valerij Vorobjov, Aleksandro Osokin kaj Evelina Sokolova). La perla programero estis koncerto de la esperantistino el Kazano Jekaterina Ŝatrova, komponistino kaj kantistino.



En la lasta vespero okazis granda koncerto, en kiu siajn talentojn, krom la menciitaj artistoj, montris Valerija Jareŝko, Aleksandr Ĥrustalev, Vladimir Sapoĵnikov, Jan Karapetjan, Sergej Rovnij kaj multaj aliaj.

Okazis interesaj ekskursoj en Kazano, en la nova scienca urbo Innopolis kaj la malnova insulo-urbo Svijaĵsk.

Bedaŭrinde, necesas konstati, ke la meza aĝo de la partoprenintoj estas 55 jaroj, kio atestas pri ioma stagnado de la Esperanto-movado en Rusio. Tamen esperigis ĉi-rilate la 4-jara Kirill Ĵitĉenko, denaska esperantisto el Ufa, kiu ĉiujn ravis per sia flua parolado en Esperanto.

Ludmila Novikova



Decidoj de la 32a Konferenco de REU

I. Koncerne raportojn pri la oficperiodo aŭgusto 2021 — aŭgusto 2023.

a) Pritaksi laboron de la Kontrol-revizia komisiono dum la oficperiodo kontentiga.

b) Pritaksi laboron de la Estraro dum la oficperiodo kontentiga.

II. Pri rilatoj kun eksterlandaj Esperanto-organizoj.

Estis preparolitaj rilatoj kun UEA, speciale koncerne la aferon pri Svetlana Smetanina.

Akceptitaj decidoj:

a) La Konferenco aŭskultis eksplikojn de Svetlana Smetanina kaj konvinkiĝis pri tio, ke Svetlana ne eldiris publike iun propran opinion pri la ukrainiaj eventoj. Partoprenantoj de la Konferenco kredas al Svetlana kaj opinias, ke aljuĝataj al ŝi eldiroj estas artefarita provoko. La Konferenco petas defendi la honestan nomon de Svetlana kaj postulas de UEA oficialan pardonpeton kaj konfirmon de tio, ke Svetlana daŭre estas en la posteno de Ĉefdelegito de UEA por Rusio. Nur post ricevo de la koncerna oficiala letero de UEA, kiu enhavu tiun pardonpeton kaj konfirmon, povas esti traktita afero pri daŭra pagado al UEA de la kotizo de aliĝinta asocio kaj pri daŭra kunlaboro.

b) Komisii al Mikaelo Abramoviĉ verki leteron al UEA nome de la Konferenco, en la letero li priskribu la pozicion de la Konferenco.

III. Nova Statuto.

a) Nova Statuto estas akceptita kun kelkaj amendoj (oficperiodo de gvidorganoj — 2 jaroj, ne pli ol 3 oficperiodoj sinsekve; konsisto de la Estraro — minimume 5 homoj; Prezidanto estas membro de la Estraro; membreco en REU — povas membri civitanoj de Rusio; emblemo de REU — verda stelo kvinpinta sur blanka fono, kun surskribo «REU»).

b) Estas nomumitaj tri personoj por fine intertrakti la enmeton de tiuj amendoj en la tekston kaj finpretigi la dokumentojn: A. Junusov, I. Tenengolc, N. Gudskov.

IV. Formalaĵoj.

a) Ŝanĝi la juran adreson de REU — de la antaŭlonge neaktuala «Avtozavodskaja, 16» al iu alia (kiun necesas trovi en labora ordo dum preparado de dokumentoj por Minjust).

b) Enigi en la datumojn pri REU en la Ŝtata registro de juraj personoj la informon pri kodoj de ekonomia agado (same en labora ordo prepari la necesan).

V. Ĉar eksterlandaj civitanoj ne plu povas esti membroj de REU, estis akceptitaj decidoj pri tiuj:

a) Boris Kolker estis proklamita honora membro de REU;

b) Statuso de ĉiuj aliaj eksterlandaj civitanoj, kiuj ĝis nun membris en REU, estas ŝanĝita al «Amiko de REU» anstataŭ «membro».

Kaj honoraj membroj, kaj amikoj de REU ricevas ĉiujn informojn (dissendatajn retpoŝte revuojn kaj tiel plu), sed ne havas rajtojn de membroj.

VI. Elektro de gvidorganoj.

Estis elektitaj:

a) Prezidanto de REU — Aleksandr Lebedev (urbo Kovrov);

b) Estraro de REU (10 personoj) — Abdurahman Junusov (Maĥaĉkala), Aleksandr Lebedev (Kovrov), Aleksandr Mitin (Niĵnij Novgorod), Jevgenij Bojĉin (Birobiĝano), Jevgenij Ĉincov (Niĵnij Novgorod), Juriĉ Karcev (Uljanovsk), Ilja Muravjov (Sankt-Peterburg), Mikaelo Abramoviĉ (Moskvo), Svetlana Smetanina (Dmitrov), Vladimir Sapoĵnikov (Krasnojarsk).

c) Revizia komisiono de REU (3 personoj) — Gennadij Basov (Stavropol), Larisa Ŝapoŝnikova (Arĥangelsk), Valerija Jareŝko (Sankt-Peterburg).

Kazani

La 19–20an de aŭgusto 2023

Ĝi estas demonstra versio de la 141-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Antaŭ 75 jaroj en Lower Hutt (reg. Velingtono, Nov-Zelando) naskiĝis Stefan MacGill, instruisto, komputisto kaj denaska esperantisto, unu el la plej aktivaj nuntempaj movadanoj. Ni sendas al nia amiko Stefan korajn gratulojn kaj bondezirojn!

Foto de Aleks André

(https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Stefan_MacGill_2015-08-01.jpg)

Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2023

3. Antaŭ 85 jaroj estis ekzekutita **Vladimir Valentinoviĉ Varankin** (Варанкин, 1902-1918-1938), rusa sovetunia pedagogo, membro de la Lingva Komitato (1930-34), redaktoro de *Ruĝa Esperantisto* (tri numeroj, 1921-22), aŭtoro de *Teorio de Esperanto: Helpilo por superaj Esperanto-kursoj* (1929) kaj de la populara romano *Metropoliten* (1933, angle 1979, ruse 2008).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 291-293).

4. Antaŭ 85 jaroj estis ekzekutita **Nikolaj Vladimiroviĉ Nekrasov** (Некрасов, 1900-1915-1938), rusa sovetunia ĵurnalisto, membro de la Lingva Komitato (1929-38), kunfondinto (1922) kaj redaktoro de *La Nova Epoko* (ekde oktobro 1923 ĝi iĝis literatur-sciencia aldonado de *Sennacieca Revuo*), poeto kaj tradukanto, i.a., de *Eŭgeno Onegin* de A. Puŝkin (1931).

5. Antaŭ 160 jaroj naskiĝis **Kejla Senderovna Zamenhof** (fraŭline: Zilbernik, 1863-1887-1921), la edzino de Lazarj Markoviĉ Zamenhof, konata en Esperantujo kiel Klara Zamenhof.

5. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Stefan MacGill** (1948-1948-), novzelandano (1948-76), nederlandano (1976-1986) kaj hungarano (1986-) instruisto, komputisto kaj denaska esperantisto; oficisto de la Centra Oficejo de UEA (1977-86, ĝia direktoro dum 1980-85); vicprezidanto (1977-79) kaj prezidanto (1979-80) de TEJO, vicprezidanto (1989-92) kaj prezidanto (1992-94, 2009-13) de ILEI, vicprezidanto de UEA (2013-19); redaktoro de la Jarlibro de UEA (1976-86), *Juna Amiko* (1986-96, 2000-13), *Internacia Pedagogia Revuo* (1990-92) kaj *Esperanto* (2016-17); aŭtoro de pluraj libroj, i.a.: *La laŭta vekhorloĝo* (1979), *Pordoj* (1985), *Najbaroj kaj borj* (1989), *Tendaraj tagoj* (3 kajeroj, 1991-94), *Nemave edifi* (2007) k. a. Ricevis la titolon La Esperantisto de la Jaro (2016) kaj la premion Onisaburo Deguĉi (2021).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 185-186).

6. Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Michel Duc Goninaz** (1933-1946-2016), franca filologo, Esperanto-instruisto kaj vortaristo, reviziinto de la novaj eldonoj de PIV (2002, 2005), membro de la Akademio de Esperanto (1976-2016) kaj direktoro de la Akademio sekcio Gramatiko (1983-92), aŭtoro kaj tradukinto de pluraj verkoj (*La fremdulo* de A. Camus, 1993; *Sonĝonovelo* de A. Schnitzler, 1997; *Kun diablo en la korpo* de R. Radiguet, 2006 k. a.), laŭreato de la titolo La Esperantisto de la Jaro 2002.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 79-80).

15. Antaŭ 110 jaroj naskiĝis **Egidius “Luuk” Wensing** (1913-1930-2004), nederlandano entreprenisto (direktoro de unu el la tri sekcioj de Philips), kunfondinto kaj prezidanto de Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio, tradukinto de kelkaj reklamaj broŝuroj de Philips, vicprezidanto de UEA (1962-72, 1974-77), la unua prezidanto de Instituto Hodler ‘68 (1968-72).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 299-300).

16. Antaŭ 110 jaroj naskiĝis **Božidar Popović** (Поповић, 1913-1932-1993), serba/jugoslavia astronomo kaj esperantisto, direktoro de Esperanto-Instituto en Sarajevo (1958-62) kaj de Jugoslavia Esperanto-Instituto (1962-65), prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Federacio (1969-79), komitatano (1953-77) kaj vicprezidanto (1973-74) de UEA, aŭtoro de populara Esperanto-lernolibro (kvar eldonoj ekde 1953), ĝenerala sekretario (1954-71) kaj prezidanto (1971-77) de ISAE, honora membro de UEA (1977).

• Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 232-233).

19. Antaŭ 15 jaroj forpasis **Bernard Golden** (1925-1945-2008), usona antropologo, arkeologo, muzeologo kaj esperantisto, en 1971 ekloĝinta en Hungario; unu el la plej fekundaj aŭtoroj en Esperanto kun pli ol tri mil artikoloj, recenzoj, beletraĵoj kaj tradukoj aperintaj en 157 gazetoj, plej multe en *Heroldo de Esperanto* (140) kaj *Monato* (126); aŭtoro de kvin originalaj prozlibroj, tri prilingvaj libroj, unu kolekto de unuaktaĵoj, kompilinto de la Esperanta parto de la 20-lingva *Dictionarium museologicum* (1986); laŭreato de 16 premioj en la Belartaj Konkursoj de UEA; membro de la Akademio de Esperanto (1983-2001) kaj direktoro de ĝia sekcio pri Ĝenerala Vortaro (1984-98), estrarano de CED (1981-86).

• Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 104-105).

23. Antaŭ 90 jaroj forpasis **Ivan Gennadjeviĉ Ŝirjajev** (Ширяев, 1877-1895-1933), rusortodoksa pastro, aŭtoro de kelkaj prozaj Esperanto-libroj, inkluzive de *Sen titolo*, kiun kelkaj taksas la plej frua originala Esperanto-romano, “iniciatinto-ĉefredaktoro” de *Enciklopedio de Esperanto* (1934).

• Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 277-278).

28. Antaŭ 50 jaroj (1973) en Tjumenon fondiĝis la **Esperanto-klubo “Revo”**, unu el la plej aktivaj en Sovetunio dum la 1970-80aj jaroj.

Aleksander Korĵenkov



Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Prezo: 30 eŭroj

Mendu ĉe via kutima libroservo

<http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120htm>

Kulturo



Post la verkoj de Ivan Bunin (marto 2022), Aleksandr Kuprin (junio 2022), Maksim Gorjkij (septembro 2022), Fjodor Sologub (decembro 2022), Leonid Andrejev (marto 2023) kaj Ivan Ŝmeljov (junio 2023) en nia literatura projekto “Rusa Novelaro 2”, en kiu aperas mallongaj prozaĵoj de rusaj aŭtoroj de la 20a jarcento, aperas kvin verkoj de Aleksej N. Tolstoj.

La ruĝa grafo

En la Sovetunia intelektula medio cirkulis jena anekdoto. Al la pordo de la palaco, en kiu loĝis A. N. Tolstoj, venis provinca kamparana-laborista delegacio. La delegaciestro diskrete demandis:

- Ĉu ni povas interparoli kun kamarado Tolstoj?
- Ne, vi ne povas, – respondis la parade vestita pordisto.
- Sed kial?
- Ĉar lia Grafa Moŝto nun estas en la Centra Komitato de l' Partio.

Tio estas nur anekdoto, kaj Aleksej N. Tolstoj neniam degnis partianiĝi, sed ĝi ne estas senbaza, kaj oni povas rememori, ke Vjaĉeslav Molotov, tiama ĉefministro de USSR, diris en 1936 komence de sia parolado en la 8a Eksterordinara Kongreso de Sovetoj*:

“Gekamaradoj! Antaŭ mi ĉi tie parolis la verkisto Aleksej Nikolajevič Tolstoj, bone konata al ni ĉiuj. Kiu ne scias, ke li estas eksa grafo Tolstoj? Sed nun? Nun li estas kamarado Tolstoj, unu el la plej bonaj kaj popularaj verkistoj en la soveta lando – kamarado A. N. Tolstoj. Pri tio la historio kulpas. Sed la ŝanĝo estis al la bona flanko. Pri tio konsentis ni ĉiuj kune kun A. N. Tolstoj mem”.

La vivo de Aleksėj Nikolájeviĉ Tolstój (Алексей Николаевич Толстой, 1882-1945) efektive estis nekutima. Eĉ lia nomo. Li ja devens el la fama Tolstoja familio kaj estis triagrada kuzo de Lev Tolstoj kaj Aleksej K. Tolstoj, sed Aleksandra Leon-tjevna Tolstaja (fraŭline: Turgeneva), la edzino de lia patro Nikolaj Aleksandroviĉ Tolstoj, naskis lin post ilia disiĝo, kunloĝante kun Aleksej Bostrom, al kiu kelkaj penis atribui la patrecon, kaj la estonta verkisto definitive ricevis la familinomon Tolstoj kaj grafecon jam kiel adoleskanto.

Sed ni haltu, ĉar la priskribo de la peripetioj de lia vivo estus romanece longa, kaj ni nur menciui, ke studante en la Peterburga Politekniko li en 1905 havis praktikadon en la Nevjanska metalurgia uzino kaj poste verkis sian unuan rakonton *La malnova turo* pri la legendoplena Oblikva turo de Nevjansk, kiu en majo 1908 aperis en *Niva*, unu jaron post la apenaŭ leginda simbolisma poemaro *Liriko* (1907). Forĵetinte la inĝenieran karieron li dediĉis sin al literaturo kaj baldaŭ famiĝis kiel aŭtoro de prozaĵoj kaj dramoj, interalie, de la romano *La lama sinjoro* (1912). Poste komenciĝis milito, en kiu li estis armea ĵurnalisto.

En 1917 Tolstoj varme akceptis la februaran revolucion, sed malakceptis la oktobran, kaj en 1918 forlasis Sovetan Ruslandon, unue irinte al la blankula Odeso,

* Ĉi tiu kongreso estis la lasta. Ĝi estis organizita por akcepti novan konstitucion. Cetero, en ĉi tiu kongreso Molotov diris plian interesaĵon: «Ni havas neniun senton rilate al la granda germana popolo, krom la sento de amikeco kaj aŭtenta estimo, sed sinjorojn faŝistojn oni devas klasi al alia nacio, nacio de “supera ordo”, kiu estas nomata “nacio” de modernaj kanibaloj-hommanĝantoj».

poste al Konstantinopolo, Parizo kaj fine al Berlino. Sed lia amo al Ruslando estis pli forta ol la malamo al ties bolŝevistaj gvidantoj, kaj jam en 1923, pli frue ol la aliaj revenintoj, li revenis al la patrujo kaj neniam pentis pri tio.

En la lando de l' venkinta proletaro Tolstoj plu vivis grafece. Malgraŭ siaj eksaj nobeleco kaj elmigranteco, kiuj povus kaŭzi gravajn damaĝojn, areston aŭ ekzekuton por la eksuloj, li vivis en komfortaj kondiĉoj, pri kiuj eĉ ne revis proletoj kaj kamparanoj. Parlamentano (membro de la Supera Soveto de USSR) kaj akademiano, la ruĝa grafo ĝuis amikecon de la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj, gloron kaj premiojn (en 1943 li fordonis sian tutan Stalinan Premion, cent mil rublojn, por produktado de tanko), luksan domon (la iaman palacon de princo Ŝĉerbatov) muzeeca meblitan kaj eksterurbajn vilaojn en Barviĥa kaj Carskoje Selo, multekostan aŭton kun ŝoforo, eksterlandajn vojaĝojn (eĉ Gorjkij ne havis tian vojaĝliberecon), privatan bankan konton, rafinitajn manĝojn kaj vinojn, amikinojn...

Sed tio estis meritita per lia elstara arta laborado. Konstantin Fedin jene skribis pri A. N. Tolstoj: "Gargantuo, biensinjoro, kruda realisto kaj cinikulo, estetikulo kaj nobla rusa fabelisto, mokanto de simbolisto kaj mem majstra simbolisto, laboregulo, dirinkulo – li vivis kun la filozofio de Omar Ĥajam kaj malamis en la vivo nur unu aferon – la morton. Lia slogano estis: fari ĉion por povi krei sian arton".

Lia populareco estis enorma. Lia triomana ciklo *La vojaĝo tra turmentoj* (iuj tradukas la titolon *La vojo al Kalvario*) – *La fratinoj* (1922), *La dek-oka jaro* (1928), *La sombra mateno* (1941) – estas unu el la plej legataj romanoj pri la Ruslanda historio, same kiel *Petro la Unua*, kiun li ne sukcesis finverki pro la morto. Liaj romanoj *Aelita* (1923) kaj *La hiperboloido de inĝeniero Garin* (1927) iĝis klasikaĵoj de la rusa sciencfikcia literaturo. Vaste legataj estis kaj estas liaj romanetoj *Miŝuka Nalymov* (1910), *Grafo Cagliostro* (1921), *La infanaĝo de Nikita* (1922), *La aventuroj de Nevzorov*, aŭ *Ibikus* (1924), *La bluaj urboj* (1925), *La vipero* (1928) k. a.

Sed la plejan popularecon ĝuis lia fabelo *La ora ŝlosilo*, aŭ *La aventuroj de Buratino*, mirinda adaptaĵo de *Pinokjo* de Carlo Collodi. Miliono(j) da sovetiaj infanoj legis-aŭdis-spektis ĝin, sed tediĝis de rusa(j) traduko(j) de *Pinokjo*. Cetere, ankaŭ la fabeloj de Tolstoj – por infanoj, kaj por aĝuloj – apartenas al la trezoro de tiuĝenra literaturo. Mi ĝis nun memoras, kian teruron mi, sepjarulo kiu tiam legadis jam dum pli ol duono de mia vivo, sentis, kiam ĉe la elhospitaliĝo post la kuracado de mia hepatito, oni deklaris, ke mi ne rajtas reporti hejmen la librojn, inter kiuj estis la 8a volumo el la "flava plena verkaro" Tolstoja kun liaj fabeloj.

Nature, liaj verkoj estis ofte surscenigataj kaj filmataj: la unua filmo *La lama sinjoro* aperis en la muta epoko, en 1915, kaj la plej freŝa (mi ne skribas *la lasta*) unu jarcenton poste, en 2017 – la 12-parta serio *La vojaĝo tra turmentoj*.

Kaj la rakontoj... Jen la ĉiama problemo de nia projekto; ili plejparte estas tro longaj por gazeta publikigo, sed ni esperas, ke vi ŝatos tiujn, kiujn ni elektis kaj tradukis por via legado.

Aleksander Korĵenkov

Aleksej N. Tolstoj

LA MORTO DE LA FAMILIO NALYMOV

La maljuna ĉambristo Glebuŝko sidas sur leda fotelo kaj rigardas tra siaj okulvitroj envolvitaj per fadeno la psalmaron, longe salivante sian rigidan fingron por turni la kadukan paĝon, kaj la kandela flamo ŝanceliĝas dekstren kaj maldekstren.

Malsekaj branĉoj kroĉiĝas al la fenestroj ekstere, kaj, aŭskultante ilian susuron, Glebuŝko pensas:

“La pasintan aŭtunon birdo same batis sin al la fenestro, mi longe pensis, sed ne enlasis ĝin – ne estas konate, kia birdo ĝi estas en tia nokto”.

La domo de Nalymovoj tremas; la metala tegmento, deŝirita de la vento, frapas; la remizoj ne videblas; nuboj treniĝas, kroĉiĝante al bruaj arbustoj; malproksime en herbejoj, rondaj fulmoj, krevante kaj blindigante falas, kaj la pluvo sterniĝas kiel kontinuaj kurtenoj.

– Estas mallume, – diras Glebuŝko, – tio estas malbona! – kaj turnas la paĝon, sur kiu estas tri marĝenaj surskriboj de la mano de Simeono Nalymov; la unua surskribo inka estas: “Edziĝinte, ĉu mi ne malobeas la leĝojn de la naturo”; plue post multaj psalmoj denove estas noto: “Sinjoro, donu al mi forton” kaj denove: “Fine mi estas feliĉa kun mia edzino, kara Anfisa”.

Glebuŝko skuas sian maljunan kapon kaj rigardas tra la fenestro, kaj longa krio venas de foraj malplenaj supraj ĉambroj.

Kunpremite la lipojn, Glebuŝko aŭskultas, kaj kiam la krio ripetiĝas, li ekstaras kaj, ŝirmante la kandelon per sia mano, supreniras laŭ la spirala ŝtuparo en siaj feltaj ŝuoj kaj senmanika jako.

La pargeto en la salono knaras, la kadro por momento ore flagras, kaj la tegitaj foteloj staras kvazaŭ la mortinta Nalymov ĵus sidis sur ili, fumante sian pipon kaj rigardante tra la fenestro.

Glebuŝko malfermas la pordon de la dormejo, kaj blanka strigo impete leviĝas de la ruĝa baldakeno super la lito kaj forflugas sur la senbruaĵ flugiloj en la malfermitan fenestron.

– Tio ne estas bona, – diras Glebuŝko kaj, algluinte sian kandelon al la polva spegulo, aŭskultas; malproksime krias birdo, rapidante super la herbo, kaj de la venta flanko venas sonorado de sonorileto.

– Kien oni veturas? – diras Glebuŝko kolere kaj, pene ferminte la fenestron, reiras malsupren.

Veninte la malplenan kuirejon, kie gisferaj tabuloj estis forigitaj de la forno kaj brikoj kolapsis, kaj poto da brasika supo varmiĝas sur la antaŭforno, li fermas la fumtubajn klapojn, krucosignas la angulojn, kovritajn per araneaĵoj, kaj ŝtopas la rompitan vitron per ĉifono, dirante: “Vidu, kiel malsekigis”. Sed la sonorilo sonis tre proksime, kaj estis aŭdeble, ke oni venis al la perono...

– Veturu pretere, pretere, – diras Glebuŝko responde al la frapado sur la pordo per vipa tenilo, – neniu loĝas ĉi tie!..

– Bonvolu malfermi, mi diras – la sinjoro venis.

– Ĉu la sinjoro?

– Aŭskultu, ja Nalymov, – la koĉero krias, tremante kaj saltante, – la juna sinjoro...

Nalymov paŝas trans la sojlon, kliniĝante, en malseka kaftano, kun orenburga ŝalo¹ volvita ĉirkaŭ la ĉapo, liaj razitaj vangoj estas entiritaj, kaj ĉe liaj okuloj estas kvazaŭ ombro.

Glebuŝko, skuante la kapon, haste demetas de li la kaftanon, malligas la ŝalon kaj, rigardante al la magra sinjoro, vestita en nigra longa jako, kisas lian manon.

– Ho, por kio vi! – Nalymov sidiĝas sur fotelon kaj, krucinte la fingrojn, diras, fermante la okulojn: – Vi verŝajne ne atendis min; sed jen ni renkontiĝis; ĉu vi ne rekonis min?

– Patro mia, kiel mi rekonu vin, ja vi estis forprenita kiel bubo.

– Sed jen mi venis, por ĉiam. Mi kaj vi restis solaj, Glebuŝko, krom ni neniu estas vivanta.

La maljuna ĉambristo, kun la manoj malantaŭ si, staras ĉe la lintelo.

– Vi devas ne resti ĉi tie, – li diras, – forveturu al la vilaĝo. La Nalymovoj ne vivas ĉi tie, ili mortas en malbona maniero.

La maldikaj lipoj de Nalymov ridetas, sed lia vizaĝo restas trista.

– Por mi estas tutegale, mi ne vivos longe, – li respondas. Rozaj makuloj aperas sur liaj vangostoj, kaj, retenante sin, li tusas obtuze, senforte lasante siajn brakojn fali.

– Ne, forveturu, hodiaŭ vi ne povas ĉi tie noktumi. Vi eble ne scias, sed estos granda peko por mi, se io okazos, – Glebuŝko ripetas.

– Pri kio vi parolas?

– Pri via avino Anfisa, hodiaŭ ni atendas ŝin. – Nalymov rapide malfermis la okulojn, rigardante la maljunulon kun scivolemo kaj kun timo.

– Rakontu, mi aŭdis nenion tian pri ŝi. Glebuŝko iome maĉis, retrorigardis en la malhelan koridoron kaj fermis la pordon.

– Foje via avo, Simeono Simeonoviĉ, vokis min kaj diris: “Bruligu la kamenon, Glebo, mi enuas!” – kaj samtempe li ion pene aŭskultas.

Mi rompas splitojn, bruas per la fumtubaj klapoj, kaj li diras al mi: “Atendu, atendu, ne frapu!” Kaj lia vizaĝo blankiĝis. “Tio estas, – mi diras al li, – mia kara sinjoro, krio de nokta birdo”. Sed li: “Silentu, malsaĝulo”, kaj subite li krias: “Forpelu ĝin de la fenestro!”

Mi ĵetis pajlon en la kamenton, nerimarkite eliris, apogis min al la muro ekster la pordo, kaj mem tremas. Subite mi aŭdis, ke la mastro ekparolis: “Mi ne kulpas, ne kulpas, lasu min... Foriru...” Kaj pli laŭte kaj pli ofte... Kaj jen li silentiĝis; poste komencis muĝi kaj falis... Mi kuris en la ĉambrojn de la servistaro, ekscitis la homojn. Ni eniris la dormejon – la sinjoro kuŝas sur la lito – mortinta. La fenestro estas malfermita, la pluvo ŝprucas tra ĝi... Kaj en la ĝardeno strigo krias – tiam ni miregis... la strigo kriis per homa voĉo...

– Mi ne komprenas, Glebuŝko, por kio vi diras tion; ja ili mortis, ankaŭ mi kaj vi mortis.

Glebuŝko faris paŝon surloke kaj daŭrigis la rakonton:

– Via avo, Simeono Simeonoviĉ, edziĝis en maljunaĝo kaj prenis kiel la edzinon la unuan belulinon en la gubernio – Anfisan. Ni esperis, ke nia domo iĝos pli gaja; sed rezultis ne tiel. Simeono Simeonoviĉ komencis dubi, eble lia animo estos difektita pro la tiom juna edzino. Ekzemple, vespere li sidas en la biblioteko kaj rigardas dian libron, mi dormetas ĉe la pordo kun pinĉilo; se li krios – mi venos, forprenos la karbon de la meĉo. Mi kompatis lin tiam – ja li legas ion en la libro, kaj nur ĉagreniĝas. Kaj kiam la noktomezo venas, li levas la kapon, liaj okuloj estas ruĝaj. “Kio, Glebo, li diras, ĉu estas malfrue? – “Malfrue, mi diras, bonvolu enlitiĝi, la sinjorino jam delonge dormas”. Li iras tra la salono al la dormejo de Anfisa, ekstaras ĉe la pordo, premas sian vizaĝon per la polmo kaj, kvazaŭ ĝi estus deŝirita kun viando, li iras al la kabineto. “Dio, li diras, vidu – mi luktas kontraŭ la tento”. Sed ankaŭ sinjorino Anfisa tre enuis dormi sola.

– Kion vi diras, Glebuŝko, Anfisa ja havis infanojn, ŝi estas mia propra avino.

– Ne, lia frato Mikaelo Simeonoviĉ havis infanojn, sed Anfisa vivis kiel virgulino... Multe da tempo pasis en tia ordo; la sinjoro jam ne aspektis kiel homo, tute sekiĝis, kaj tuj kiam li aŭdis ke la edzino venas, li tutkorpe tremis. Kaj sinjorino Anfisa vespere ĉiam kantis kantojn, sidante sur la fenestrobreto.

Lia nevo, husaro Aleksandro Nalymov venis al ni antaŭ aŭtuno; mia Dio, kia tumulto estis. Lia uniformo estis ruĝa, li havis bandaĝon sur la kapo (li estis vundita ie); li marŝis, tordis siajn lipharojn, kaj dum li rigardis virinon, liaj okuloj kvazaŭ elfalis. Simeono Simeonoviĉ tuj enpensiĝis: Anfisa iĝis tre alloga kaj gaja. La tutan tagon, la tutan tagon, jen en la ĝardeno, jen ĉe la klavikordo, kaj la husaro alkroĉiĝis al ŝi. Kiam li vidis Simeonon Simeonoviĉ, li batis lian ŝultron: “Nu, onklo, ni ankoraŭ batalos”. Ne pasis eĉ semajno, Simeono Simeonoviĉ vespere diris al mi: “Iru ni al la ĝardeno”. Ni venis. Ni iris al la fenestro de Anfisa, li denove diras: “Grimpu sur la arbon, rigardu”. Mi grimpis sur tremolon, disigis branĉojn kaj rigardis – la husaro sidas antaŭ la spegulo; lia uniformo malbutonita, liaj haroj malordigitaj, kaj nia sinjorino Anfisa nur en ĉemizo staras antaŭ li kvazaŭ en sonĝo. Li kaptis ŝin, tiris al si, ŝi kovris la vizaĝon per siaj manoj... Mia rigardo tuj malklarigis, mi glitis sur la herbon, kaj la sinjoro demandas: “Ĉu ili estas tie?” Subite la husaro rigardis el la fenestro, kaj la lumo en la ĉambro estingiĝis... Ni kuris, kaj

kiam ni eniris la salonon, la husaro staris sub la lustro, tenante la manojn ĉe la koksoj, kiel la diablo.

Simeon Simeonoviĉ ĵetis sin al li, sed tiu iris flanken kaj diris laŭte: “Ĉesu, onklo, mi venis por diri al vi, ke via edzino estas ino malĉasta... Ĵus, invitinte min, kiel parencon, en sian ĉambron, ŝi volis malhonori viajn grizajn harojn, proponante al mi malnoblan konkubadon. Jen!”

Poste li turnis sin sur la kalkanumoj kaj eliris, tintante siajn spronojn. Simeono Simeonoviĉ kaptis sian kapon, kuris al la edzina dormejo, tiris la pordon, kaj ni vidis ke Anfisa leviĝis sur la fenestrobretton, retrorigardis sian edzon kaj saltis suben. “Kaptu ŝin! Tenu ŝin!” – kriis Simeono Simeonoviĉ. Ni kuris post ŝi, pensante, ke ŝi mortis pro la falo. Ni rigardis – ŝi jam hastas al la lageto... Ni ne sukcesis atingi ŝin! Sed ankaŭ en la lageto oni ne trovis ŝi. Tie estas profunde, tre profunde...

La voĉo de Glebuŝko rompiĝis; Nalymov aŭdis, kiel branĉoj vipas kaj la kamen-tubo hurlas.

– Ŝia malkvieta animo, – Glebuŝko finis, – forlogis kun si ĉiujn Nalymovojn; jen ŝi ŝajnigis sin birdo, jen muso, jen ŝi venis en sia propra aspekto. Kaj atentu – tio okazis ĉi-nokte.

– Eble ĉio ĉi estas vera, – diris Nalymov. – Ĉu vi vidis ŝin, Glebuŝko?

– Jes, hodiaŭ ŝi kriis antaŭ via alveno.

Nalymov, ridetante, pene ekstaris kaj, karesante la harojn de la maljunulo, premis lin, kiom li fortis, al sia brusto kaj kisis lin.

– Mi tamen ne foriros de ĉi tie, por kio ŝi bezonu min tian, mi baldaŭ mortos ĉiuokaze; mi tre laciĝis, donu al mi vian liton por hodiaŭ, kara Glebuŝko! – Kaj, senfortiĝinte, li demetis sian jakon kaj kuŝiĝis, peze spirante.

Glebuŝko lumigis la lucernojn antaŭ la ikonoŝranko, fiksas kandelon, surgenuiĝis kaj ekpreĝis, tuŝante la plankon per sia vizaĝo. “Savu kaj kompatu lin, prefere mortu mi, se necese, mi kun ĝojo fordonos mian spiriton; kaj trankviligu ŝian malican koron, forprenu ŝian manon”. Poste Glebuŝko kuŝiĝis ĉe la pordo sur la felta tapiŝo.

Nalymov sciis, ke Anfisa jam longe staras post la muro. Ŝi pasigis sian ostan manon laŭ la fenestra vitro, kaj ŝia, kvazaŭ skulptita, vizaĝo rigardis tra la fermitaj palpebroj.

“Jen vi venis, – Nalymov pensis, – ne turmentu min, eniru!”

Ŝiaj lipoj pene volas malfermiĝi, kaj malseka branĉo trafas ŝian vizaĝon, pro tio gutoj fluas sur ŝia vango kiel larmoj. Kuŝante surdorse, kun la manoj kunmetitaj, Nalymov malvarmiĝas, petas ŝin eniri, pensante, ke ŝi trankviligos.

Jen Anfisa jam estas ĉi-flanke de la vitro, levas la robon, kuŝiĝas, nehaste konkerante lian korpon. Ŝia firma mano estas sur lia kolo, kaj Nalymov diras: “Ĉu vi pardonos, kara, mi estas la lasta?”

Malrapide kliniĝante super li, Anfisa malfermas la okulojn, ilian travideblan profundon vidas Nalymov, disiĝante de la nenecesa lito, sentante la ĝojon de pardono kaj amo.

Ventoblovo frakasas la vitron, malseka kaj malhela ĝi blovas tra la ĉambro, estingante la lucernojn, kaj Glebuŝko, leviĝanta kun ĝemo, vokas:

– Sinjoro, patro mia, forpelu ŝin!..

Tradukis **Vladimir Jurganov**

LA INKMAKULO

1

Super tablo, kovrita per inkmakulita blua papero, brulis eta lampo, pendanta de la plafono, lumigante amason da leteroj kaj du magrajn, rapidajn manojn; la maldekstra plukis leteron el la amaso, portis ĝin al la plata nazo kun ruĝa veruko kaj nazumo kaj ĵetis ĝin al la dekstra, kaj la dekstra ŝovis ĝin al unu el la tirkesto de la ŝranko staranta apud la tablo.

Ĉi tiu ĉiutaga kaj monotona laboro ne tro ŝarĝis la pensojn de la poŝtoficisto Krymzin; kaj la pensoj nenien rapidis, ili dormetis, rapide moviĝis nur liaj senkoloraj okuloj. Sur unu el la anguloj de la tablo siblis samovaro.

Dormemo regis en la poŝta oficejo, en la du salonoj de la eta fervoja stacio, kaj je pluraj verstoj ĉirkaŭe, kaj nenio povis ĝeni la laboron de Krymzin.

Subite lia maldekstra mano, kaptinte bluan koverton kaj apenaŭ ne ĵetinte ĝin al la dekstra, ekstremis kaj haltis. Krymzin fortiris la nazumon kaj, dismovinte siajn kubutojn, tralegis la adreson sur la koverto:

“Bieno Sosjonki, Al Aleksandro Petroviĉ Timenkov”.

Sur liaj kavaj vangoj aperis ruĝaj makuloj, liaj maldikaj lipoj sub la spongecaj lipharoj leviĝis kaj formis rideton. Li ekstaris, venis al la samovaro kaj balbutis:

– Lizinjo tre sopiras. Verŝajne, ŝi la tuta angoras sen sia kara amiko... Nu, kion vi skrapis, mia karulino...

Krymzin per la tremanta mano, malpura pro inko kaj kun ŝiritaj ungohaŭtetoj, mallonge tenis la koverton super la samovara vaporo, singarde malfermis kaj, flarinte la susurantan leterfolion, eklegis ĝin sub la lampo.

Ĝi estas demonstra versio de la 141-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kunmarŝi

de Laure Patas d'Illiers



Bonvena silento anstataŭis la senhaltan zumadon de motoroj. Mallonga, tro mal-longa kvieto, tuj interrompita de nazosona laŭtilo, kiu en hakita angla petis, ke la pasaĝeroj restu sidantaj ĝis kiam la stevardinoj invitos ilin elaviadiliĝi. Preskaŭ ĉiuj pasaĝeroj tuj stariĝis pro ne subpremebla deziro eliri inter la unuaj. Ili brue malfermis la багажун super siaj seĝoj, elprenis sian valizojn, sinsekve paŝis inter la seĝovicoj kaj are premiĝis ĉe la aviadilvosto.

Kompreneble Stefano restis senmova. Li malŝatis proksimecon al nekonatoj. Jam sufiĉe malagrabilis, ke li devis dum horoj sidi inter homoj en ĉi tiu metala skatolego. Neniel li irus algluiĝi inter dorsosako kaj barelventro, nur por gajni kelkajn sekundojn. Li kliniĝis flanken super la sidloko forlasita de lia najbarino kaj rigardis tra la luko. Vastega ĉielo el pala koloro, kie hezitema bluo luktis kontraŭ nuboj de flaveca polvo. La aero certe estis poluita super la ĉefurbo pro la nafta kaj mina industrioj.

Sed tie, kien li estis ironta, la aero estas pura. Sur la altebenaĵo la stepo etendiĝas ĝis la malproksimaj montoj, balaita de hasta vento kiu kantigas la herbojn kaj fleksas la arbetojn. Dum la tuta jaro li turniĝis kiel enkaĝigita sciuro en la ciklo de ĉiutaga rutino, sopirante al la venonta unusemajna ferio. Li estis luonta ĉevalon, unu el la lokaj ĉevaloj, fortikaj kaj malgrandaj, kun taŭzita longa hararo, kiuj ŝajnas deveni rekte el la prahistorio. Tute sola, la senlima stepo kuranta sub liaj hufoj, la senlima ĉielo blovanta super lia kapo, li estis vojaĝonta ĝis la fino de tiu ebena mondo, kie montaro staras kiel muro. Li haltos en iu el la urbetoj alpremiĝintaj al la montorando. La tieaj urbetoj sobre pluvivas atendante la bonfaran pluvon, kiam nuboj pelataj de la stepa vento kolizias kontraŭ la deklivo de la montaro.

Stefano elaviadiliĝis la lasta. Per malrapidaj paŝoj li iris tra la flughavena halo, jam dezerta je pasaĝeroj. Lia nura багажo estis longa mola sako, kiun li estis aligonta malantaŭ sia selo dum rajdado. La taksiisto proponis al li “tre bonan hotelon, tre proksiman al la stacidomo”, almenaŭ tion Stefano komprenis. Li kapjesis. La veturado de la flughaveno al la urbocentro daŭris pli ol unu horon pro teruraj

trafikŝtopiĝoj. Laŭ la taksiisto, tio estis normala, ĉar estis posttagmeze. Ĉiuj ŝoforoj ŝajnis kredi, ke aŭton oni stiras tiom per hupo kiom per stirrado. La bruo estis senĉesa, kun sporadaj sonoj pli akraj ol la fono. La ŝoforoj vigle alkriis unu al la alia, sed – almenaŭ tiel ŝajnis al Stefano – sen agresemo, kun mokema tono. Subite biciklo trapasis antaŭen, kaj la taksiisto estis devigata abrupte bremsi por eviti kolizion. La ŝoforo ĵetis al la juna biciklanto frazon, kiu ridigis ilin ambaŭ. Stefano havis la impreson, ke temas pri obscenaĵo.

Veninte en la hotelon, Stefano ekparolis kun la juna akceptisto, kiu, dank' al pluraj jaroj en Londono, parolis kompreneblan anglan. La trajno, per kiu li estis vojaĝonta, foriros morgaŭ posttagmeze. Sur la akcepteja tablo kuŝis nacia gazeto, sur kies kovrilpaĝo oratoro levis la brakojn antaŭ aplaŭdantoj. Pli kaj pli da homoj naŭziĝas pro nia korupta reĝimo, gejunuloj volas pli da libereco kaj deziras vivi kiel en via mondoparto, asertis la akceptisto, kvazaŭ ri penus konvinki sian kunparolanton. Stefano respondis, ke li estas nek ĵurnalisto nek politikisto sed nur turisto. Komercistoj kaj hotelistoj ankaŭ volas pli da malfermita negoco, nia lando bezonas pli da turistoj, respondis la akceptisto. Ri videble esperis ke Stefano estu la antaŭulo de estonta turista grego. Sciu, ke morgaŭ okazos granda manifestacio. Ĝi pasos en la avenuo, tie, ĉe la fino de la strato – ri montris per sia brako, kvazaŭ ri jam vidus la marŝantaron. Vi vidos, ke la tuta popolo pensas laŭ la noviga opinio, ri aldonis. Ria voĉo fajris pro entuziasmo. Ĝi ankaŭ iom raŭkis, eble pro la duonplena botelo da forta alkoholaĵo kiu staris apud la gazeto.

La sekvan tagon Stefano decidis promeni en la urbo antaŭ la elirhoru de sia trajno. La suno origante la fasadojn donis al ili pli da splendo ol meritis iliaj konstrumaterialoj. Sur la trotuaroj, preterpasantoj trankvile paŝis. Stefano aŭskultis la muzikan ritmon de iliaj voĉoj, kiuj ŝajnis interŝanĝi pacajn bagatelaĵojn. Ĉio ĉi ne odoris je naskiĝanta revolucio, nur je malhastemo de submetiĝema kaj fatalisma popolo. Li tagmanĝis en la privata korto de restoracio. Li frandis bongustan raguon, evitante demandi el kiu besto devenis ties viando. Tre forta kafo, servita en eta taso, eligis odoran nubon, kiu plenigis liajn naztruojn. Kiam li forlasis la korton, Stefano sentis sin ventropeza. Li aŭdis ankoraŭ malproksiman zumon, la nepridubeblan sonon de marŝanta homamaso. Li aliris la avenumon menciitan de la hotela akceptisto. En la ombro de la arboj, kiuj vicis laŭlonge de ambaŭ trotuaroj, kelkaj grupoj kaj solaj homoj silente atendis. Iliaj sintenoj estis rigidaj, iliaj vizaĝoj nenion esprimis, iliaj lipoj estis kunpremitaj. Stefano sin demandis, kiom da ili estis observantoj el la sekreta polico.

Ĝi estas demonstra versio de la 141-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Formiketo

de Paulo Sérgio Viana



Ĉiuj nomis ŝin Formiketo. Ŝi estis etkorpa, rapidmova, celkonscia kaj precipe senlace moviĝema. Ŝi estis la respondeca flegistino en la Dua Sekcio por viroj en la hospitalo. Tiutempe la plej malriĉaj pacientoj estis lokitaj en grandaj ĉambroj kun dek aŭ dudek vicigitaj litoj, unu apud la alia. Ankaŭ mi laboris kiel juna kuracisto en la Dua Sekcio dum kelkaj jaroj, kaj mi povis de proksime akompani la laboron de Formiketo. Ŝi estis obsedata de la deziro pri pureco kaj ĝustatempa flegado de tiuj malfeliĉuloj, kiuj enhospitaliĝis pro plej variaj malsanoj. Al ĉiuj ŝi dediĉis seriozan, silentan sed efikan atenton. Tiu sinteno kontaĝis la ceterajn laboristojn, de purigistoj ĝis aliaj flegistoj, kaj eĉ la kuracistojn. Rezultis, ke tiu sektoro estis la plej efike funkcia en la tuta hospitalo. Per malmultaj vortoj kaj precizaj tuŝoj kaj sintenoj, ŝi klopodadis injekti, kune kun medikamentoj, iom da espero kaj optimismo.

“Morgaŭ vi fartos pli bone!” – estis ŝia ĉiutaga, eĉ ĉiumomenta refreno. Kaj la kompatinduloj efektive kvietiĝis.

Pasis multaj jaroj. Mi delonge ne laboras en tiu hospitalo. Fakte mi jam estas emerita kuracisto, kaj nuntempe mi pasigas mian tempon en legado, skribado de leteroj al miaj amikoj, aŭskultado de muziko, kaj al longaj piediraj promenoj, dum kiuj mi meditas pri la efemereco de la vivo. Restas malmultaj amikoj, kiuj pretas iom interparoli kun diskreta maljunulo.

Tamen, antaŭ kelkaj tagoj eksonis la sonorilo de mia apartamento kaj por mia granda surprizo staris post la pordo eta maljunulino, pri kiu mi bezonis kelkajn minutojn por rekono:

– Formiketo!

Ĝi estas demonstra versio de la 141-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nuntempa hispana poezio verkata de virinoj (2)

de Miguel Fernández

Pilar del Pozo

Petite pri sinprezento por la legantoj de *La Ondo de Esperanto*, la poetino Pilar del Pozo sendis al mi hispanlingvan noton, kies enhavo, en mia esperantigo, jenas:

“Kvankam Lisbono faris ŝin blua, ŝi naskiĝis en Madrido en 1973, en la lasta etapo de la nacia-katolikisma diktaturo. Ŝi ricevis la nomon Pilar, kiu, kune kun la familiaj nomoj¹, “del Pozo” kaj “Manchado”, konsistigas la esprimon Pilar del Pozo Manchado [Baseno de la Puto Makulita]. Multajn jarojn poste certa eldonisto miskredis, ke tiu kompleta nomo estas pseŭdonimo elektita de la poetino. Infanaĝe, ŝi malkovris skribadon kiel fabelan kaŝejon por la imago. Siatempe, ŝi studis ĵurnalismon en la Madrida Universitato Complutense por trovi la veron, kiun kaŝas la speguloj. Ŝi kondukis la radio-magazinon *En tu piel* [Sur via haŭto] en Radio Las Águilas [Radio la Agloj], kaj dum deko da jaroj ŝi laboris kiel redaktorino en diversaj reklam-agentoj. En 2006, la vivo faras ŝin instruistino pri hispanaj lingvo kaj literaturo aŭ, alie dirite, ŝi ekkonscias pri la graveco de ĉio rakontata de infanoj. En 2014 ŝiaj poemoj alvenas al literaturaj gazetoj, kiel *Alborismos*, kaj al antologioj, kiel *Poemas en la noche* [Poemoj en la nokto] aŭ *¡Somos grito!* [Ni estas krio!], kaj ŝi partoprenas en la festivalo pri virina dramaturgio *Atenas 2021* [Atenoj 2021] per sia monologo *Jarrón chino* [Ĉina florumo]. En 2019 estis publikigita ŝia unua poemaro *A esta altura de tejados* [De sur ĉi tegmento alta loko], kaj en 2021 ŝia dua *La verdad según Lady Macbeth* [La vero laŭ S-ino Macbeth]. Kvankam ŝi dormas, kiam ŝi ne legas, ŝi ŝtelas tempon de siaj dormohoroj por kundividi kun legantoj mikronovelojn, poemojn kaj aforismojn pere de sia verkistina blogo <https://lenguascomopeces.blogspot.com/>”.



Sekvas, en mia traduko, la seso da poemoj, kiujn Pilar del Pozo elektis por *La Ondo de Esperanto*.

PRI KIO ILI PENSIS?²

Pri kio pensis
la aŭgusta frida sango,
la ena nokto en Granado,
ĉiu vojkurbiĝo,
haŭtoj nigraj pro sufero, la nigra plotono?
Pri kio ili pensis?
Pri kio ili pensis?
La tremado de l' speguloj,
la voĉo tra la fendoj, la sidlokoj,
la lum' el la kvar reflektoroj,
la hurlo en la vezikoj,
pri kio ili pensis?
La preĝo de la cikadoj,
la salo ĉe l' ok okuloj,
la ĉegorĝaj vitropecoj,
la kri' en la seka buŝo,
pri kio ili pensis?
Kaj la fingro sur pistola ellasilo,
la grimaco de l' fusiloj,
la pistoloj kaj la pafoj,
la trenstrio de la sango?
Pri kio, je mil diabloj, pensis
la faldita banderilista karno,
la kreta flako el la instruisto,
la pezo de la postmorta poeto-dio,
en la aperta ventro de la tero?
Pri kio pensis,
matene je la kvina,
la plenŝoveloj el plenluno,
la tragedi', l' elegio,
la fekunda voj-fosaĵo?
Ĉu konjekteblas pri kio la rondo
de uniformitaj vulturoj pensis
ĉe la lasta el liaj versoj,
ĉe la ruĝa rando de l' mateno?

Oni neniam trovis
spurojn nek fekaĵojn,
eĉ ne skeleton de taŭr-kapa giganto
bonan kiel eksponaĵo en urno de greka muzeo.
Certe Minotaŭro loĝis nur
en la fikcio de epopeo.

Tamen
ekzistas multaj labirintoj kiel Dedalo.
Sufiĉas legi Borges⁴-verkojn por kompreni,
ke ĉiu labirinto
konkretiĝas al la stertoroj de la infano, kiu ni estis.
Nu, ĝuste tiu estas la monstro, pri kiu ni okupiĝas.

Kiam fine dormas la lupoj de la domo,
kiam la nokto atendas por akiri sian tributon,
la timo hurlas enen.

Dedalo,
kun la kapo apogita sur kuseno el plumoj,
konstruas samtempe
labirinton kaj flugilojn.
Jen la blinda poeto
observas, centre de duondormo, kiel
Dedalo starigas pasejojn por nekonscie kaŝi
la plej fian el la bestioj: la timon.

Ĝi estas demonstra versio de la 141-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Iomete malsamaj, sed ne tre

Johansson, Sten. *Falaflo en maco*: Originala romano. – Novjorko: Mondial, 2023. – 179 p.

Novan libron de Sten Johansson mi ĉiam malfermas kun intereso, anticipante plurhoran bonan legadon. *Falaflo en maco* promesas al ni kuraĝan traktadon de tikla kaj komplikita temo, nome la konflikton inter Israelo kaj Palestino.

Sten rakontas pri la konflikto tra la perspektivo de la juna svedino Filippa. Ŝi ne havas multajn memstarajn opiniojn, sed ŝia koramiko Kasim havas tre multajn. Kasim estas palestindevena svedo, ne tro religiema, sed ĉiam preta batali kontraŭ “porkaĉoj” (la polico) kaj “cionistoj”. Filippa estas juddevena kaj same sekulara kiel Kasim, sed sen multe da scio pri sia juda heredo. Per la rakontoj de sia avo Wilhelm ŝi lernas la mirindan historion de sia familio.


Ni, la fidelaj legantoj de Sten, jam konas tiun avon, ĉar ni renkontis lin en la epiloĝo de lia romano *Secesio* (2021), kiel filon de la skulptistino Louise. (Legu pli en *La Ondo de Esperanto*, 2022, №314, p.126-127).

Falaflo en maco estas parte memstara daŭrigo de tiu romano. Se vi ankoraŭ ne konas *Secesion*, legu ĝin poste, ĉar eblas legi ambaŭ librojn memstare.

La nuntempan parton de *Falaflo en maco* mi trovis, je miaj surprizo kaj bedaŭro, ne tro interesa. Eĉ Filippa enuas: “Ŝia rilato kun Kasim daŭras kiel antaŭe, sen dramoj, sen krizoj, sed ankaŭ sen novaĵoj aŭ surprizoj” (p. 139). Por spici sian tedan vivon ŝi havas kromamaton por nura amorado. Ties precipa funkcio estas konatigi nin kun opinioj de svedoj, kiuj rigardas enmigrintojn pli kritike ol la oficiala interkonsento. Ni lernas pri kontraŭislamistaj tipoj kiel Lars Vilks kaj Dan Park, kiu faras kion ajn por tiri la atenton al si mem. Ankaŭ la dana novfaŝisto Paludan trovas mencion. Por legantoj ekster Skandinavio povas esti utila scio, ke apud la glima imago de Svedio kiel homaranisma mondĉampiono tie ekzistas ankaŭ tiuj uloj.

Filippa havas onklon en Israelo, kiu malŝatis la sekularisman vivmanieron kaj turnis sin al iu ortodoksa sekto. Ni nur aŭdas pri li, sed neniam renkontas lin. Tio montru al ni, ke ankaŭ estas radikaluloj inter la judoj. Krome Sten inventas kompletan galerion de parencoj kaj amikoj, kiujn Filippa vizitas en la kvina ĉapitro. Ili aperas nur unu fojon, por ilustrati, mi supozas, la vivmanierojn de ordinaraĵoj kaj poste ili malaperas sen plia funkcio en la romano. Ni aŭdas ne tro multe pri la amikoj de ŝia koramiko Kasim.

La protagonistoj en *Falaflo en maco* ne multe evoluas, dum la socio ĉirkaŭ ili radikaliĝas. Provizore la lasta ŝtupo estas publikaj bruligoj de la Korano sub la preteksto de “libera esprimo de opinio”. Jen Sten tuŝas temon, kiu estas ĝuste nun vigle diskutata en Svedio kaj Danlando. Legante tiun romanon, vi estos meze en la aktuala diskuto. Jen okazo por ĝisdatigi vin.



Tre legindaj estas la viglaj historiaj priskriboj. Post la fino de la Dua Mondmilito Willi, la alia protagonisto de *Secesio*, vojaĝas al Hamburgo. Jen kion ŝi vidis (p. 107):

“La unua vera ŝoko okazas, kiam la trajno eniras la antaŭurbojn de Hamburgo, aŭ tion, kio iam estis antaŭurboj. Dum duonhoru ŝia vagono malrapide treniĝas tra luna pejzaĝo el brikamasoj, gruzo, ŝtonoj, feraj stangoj kurbe elstarantaj, duonaj muroj, sur kiuj pendas radiatoroj, kiuj ne plu havas ĉambron por hejti; kaj ĉie amaŝiĝas polvo, griza, bruna kaj nigra polvo. Ne eblas vidi la stratojn, aŭ eĉ distingi, kie ili iam estis. Ĉio estas same kovrita de rubo. Jen kaj jen en tiuj ekskvartaloj iras homoj, fosante, gratante, piedbatante, pikante en la gruzo kaj inter la brikpecoj.

Kion ili serĉas tie nun, jaron kaj duonon post la militfino? Ne eblas kompreni. Ĉu pecetojn da karbo aŭ ligno por varmigi sin en la novembra humido? Sed kie ili loĝas? Ĉu restas loĝeblaj keloj sub la rubamasoj? Willi ne povas imagi”.

Se mi ŝaltas la televidon, mi devas konstaterne konstati, ke tiuj bildoj denove estas aktualaj.


Wolfgang Kirschstein

Reĝo Ubuo

Jarry, Alfred. *Reĝo Ubuo: Teatraĵo / Tradukis el la franca Thomas Larger, Thierry Tailhades. – Paris: Espéranto-France, 2023. – 110 p. – (Serio Oriento-Okcidento, №62).*

En la komenco en la 20a jarcento aperis arta movado, kiu skuis la mondon: superrealismo. Ĝi rezultis de la studoj de Freud pri la nekonscia dimensio de la homa psiko, kaj ankaŭ de drastaj politikaj ŝanĝoj en la mondo. La malforta homo jam ne scipovis kompreni sian komplikitan mondon, precipe en la eŭropa kulturo. La realo estis jam transcenda, tiel ke necesis esprimoj de sentoj pere de rimedoj situantaj “super” ĝi. En oktobro 1924 André Breton publikigis Manifeston de Superrealismo, kaj tio markis la naskiĝon de tiu movado.

Senbridaj sentoj, instinktaj agoj, senlima imagado, rifuzo de kritiko per raciaj argumentoj — jen elementoj de la nova artokoncepto. Realo kaj nerealo interplektiĝas, serĉe de plej fortaj emocioj. Oni celas nun la fantaston, oni jam ne rekonas kontraŭdirojn.



Ĝi estas demonstra versio de la 141-paĝa septembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” bonvenigas humoristojn, karikaturistojn, enigmoverkantojn kaj aliajn “leĝerĝenrajn” aŭtorojn por kunlaboro en nia relanĉita rubriko “Mozaiko”.

Septembro, la eklerna monato

Ekkoninte la salajrojn de futbalistoj kaj kantistoj, mia filo komprenis ke la plej gravaj fakoj en lernejo estas sporto kaj muziko.

Instruistino diras kolere al knabo:

- Morgaŭ venigu vian avon!
- Eble la patron?
- Ne, ĝuste avon. Mi deziras montri al li, kiajn stultajn erarojn faras lia filo en viaj hejmaj taskoj!

Instruistino klarigas al amikino kio estas lernoĵaro: “Nu, ĝi daŭras naŭ monatojn — same kiel gravedeco. Sed mi naŭzas jam ekde la dua...”

Instruistino denuncas sian lernanton:

- Via filo fumis kanabon!
- Sed kie li prenis ĝin?
- Li diris, ke ĉe la plej bona amiko.
- Ĉu li vere diris tiel? Kiel kortuŝe...

Instruistino kolere elbuŝigas al patrino:

- Via filo estas tute senhonta estaĵo! Trompulo, mensogulo, fripono!
- Dio mia, ĉu li iĝos krimulo?
- Hm, plej verŝajne politikisto...

Knabo protestas en lernejo:

- Por kio mi lernu tiujn kemiajn reakciojn? Neniam en la vivo mi bezonos ilin!
- KREDU min, ke vi pensos male, kiam vi faros hejmajn taskojn kun via filo...

Nova servo “patro por unu horo”. Laŭmende, bone vestita serioza viro venos al lernejo kaj atente aŭskultos plendojn pri la gefiloj de la kliento.

Instruistino de Agatha Christie skribas en taglibro: “Agatha verkis raporton pri biologio kaj mi legis ĝin jam trian tagon. Espereble la murdisto ne estas zebro”.

Virino sidas sur benko en parko. Viro sidiĝas apud ŝi kaj ekparolas:

- Pardonu, sinjorino, ĉu vi estas instruistino?
- Jes, mi estas, sed kiel vi divenis? — ŝi mirigite demandas.
- Tre simple, via vizaĝo estas tre stulta.
- Arogantulo! Cetere, ankaŭ via vizaĝo elstare stultas!
- Jes, mi scias, ja ankaŭ mi estas instruisto, — la viro triste konfesas.

Plukis kaj tradukis **Stano Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Ne tre difinita, la voj' elektita

Se vi emas promeni tra la urbo memstare... vi povas elŝuti... gvidilon kaj relativan mapon... (*Promenadoj tra la urbo // La Taŭra Voĉo*, 2023, №2, p. 2.)

UK trankvila kaj sendolora?

Aliĝado al Aruŝa: Tanazio atendas vin! (Stefan MacGill. *Simpozioj de ILEI // EKO*, 2023, №48)

Venu la ĝustan kazon!

La Civita banko konsideros eventualan helpon nur se venos de ili rektan, oficialan peton. (*Timoj pro bankroto en la sveda Esperantio*, esperantio.net/index.php?id=4734, 7 apr 2023; trovis Ionel Onet)

Taŭga por la sulko!

Pri la komitato de UEA, eksmoda fosila organo, ni eĉ ne parolu. (liberafolio.org/2022/07/19/uea-kritikata-pro-troa-neutraleco/#comments)

Senvolaj elĵetoj, aŭ: Semas konstante?

... turmentas la nuntempan mondon... polucio de la naturmedio... (Roman Dobrzyński. *La Zamenhof-Strato*. Kaunas: Varpas, 2003, p. 226)

Nepre ne vuajerisme

... fari TEJO-n kaj ĝiajn eventojn pli sekuraj spacoj kontraŭ seksperfoto kaj ĝenado. (liberafolio.org/2023/02/08/tejo-havas-mil-membrojn-sed-neniun-akso-n)

Eĉ ne obstinuloj aĉetos

La prezo de finfine iom pli ol 4,- € verŝajne forpelas mulajn interesitojn. (Peter Weide, groups.io/g/uea-membroj/topic/malbona_novajo_el_hungarujo/92679732; rimarkis Lu Wunsch)

Ne plu nudpiede

Post tio ŝua aktivado en Esperantuko fariĝis seninterrompa. (*Irina Gonĉarova festas jubileon! // Ponto*, 2021, №121, p. 2.; trovis Ibrahim Bryzgaloff)

Giganto li ja estis!

Zamenhof estis priskribita kiel arda reformisto, li ne etis tia. (liberafolio.org/2021/12/15/rigardo-malantau-la-sanktulan-bildon/#comment-8006; trovis Kal-le Kniivilä)

Ŝtuparo al plena posedo

Ankaŭ ĉar la poemojn necesas deklami en Esperanto kaj ĉina lingvo sur la sceno, ni fondis kvinperonan tradukogrupeton... (Wu Guojiang. *Ni kunlabore verkis emocivekan poemon // Esperanto*, 2022, №11, p. 235)

Plukis **István Ertl**

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Norvegio: Esperanto-Oslo, Morenefarefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 141-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>